

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

2000

ISSN 0032 - 4361

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esp.
V-19034/2000

Renkonte al la nova jarcento
Aliflanke de familio
Li verkas poemon de homa vivo

★ POPOLA ĈINIO



Mirinda valo
en Kuqa **32**





Li verkas
poemon
de homa
vivo **12**



Pekino: invito
de Olimpikoj
kaj medipro-
tektado

Vestoj de
de'ang-oj **19**



25
“Ĉarmaj
floroj” en
marfun-
do



- 3 **INTER NI**
 4 Renkonte al la nova jarcento
 5 Aliflanke de familio
 8 **ĈINAJ E-ISTOJ:**
 Esperanto kaj mi
 9 **KORESPONDI DEZIRAS**
 10 **50-JAROJ — EPĈ:**
 Ĉinio — lando malproksima kaj proksima;
 karaj rememoroj
 14 **ORIGINALE VERKITAJ:**
 Poemoj
 15 Bela okcidenta Hunan
 24 **ESP-NOVAĴOJ**
 28 Hidroelektra urbo ĉe la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero
 29 **NUNTEMPA BELARTO:**
 Pri pentristo Zhou Zhilin
 36 Du pigoj en mia hejmo
 38 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
 39 Kune ĝui la paseon
 42 Pitoreskejoj ĉe Huludao
 43 **POR KOMENCANTOJ:**
 Kiu estas pli favordonema?
 44 En kaj ekster klasĉambro
 46 **ĈINA KULTURO:**
 La historio de ŝuoj de Ĉinio (II)
 49 **KURANTAJ AFEROJ**
 51 **ĈINAJ METIARTAĴOJ:**
 Glazurita vazo kun blujaj desegnoj

INTER NI

Ĉi tiu numero (507) estas la lasta papera numero de nia revuo. Fakte, kun granda bedaŭro ni ĝin preparis. Estas neforgesebla por ni la kunlaboro kun vi ĉiuj. La granda ĝojo, kiun ĝi alportis al ni, estas multe sopirata. Dank' al Esperanto, nia komuna lingvo, ni kaj vi konatiĝis, interkomprenis kaj amikiĝis. Kompreneble, ni ne forgesis la iamajn mankojn kaj erarojn en nia revuo. Pardonu, ke ni ne multe petis viajn opiniojn, antaŭ ol ni decidis anstataŭigi la paperan eldonon per la reta.

Ni bone scias, ke Esperanto disvolviĝas ne facile. Sed ĝiaj granda vivipoveco kaj vasta distribuo kaj la obstina strebado de ĝiaj adeptoj montras, ke Esperanto estas lingvo kun bona espero kaj bela perspektivo. Ni iam diris kaj nun ankoraŭ diras, ke en la estonteco ni ĉiam persiste kaj ĉiamaniere aplikos kaj disvastigos nian belan lingvon Esperanto.

La Red.



Alvenas la nova jarcento
Foto de Da Wei

Estos bunta kaj ĉarma la nova jarcento, kies alvenon festas la homoj kun gajeco. Junuloj estas mastroj de la nova epoko. Ilia dolĉa rideto anoncas pli belan estontecon.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
 Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fakoj de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P.O. Kesto 77,

Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:

+86-10-6832 1808

Retpoŝto:

epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn>

/ElPopolaCxinio>

12[507]2000

lertaj en batado de sia edzino. Sed laŭ mia imago tio devis resti en la historio, antaŭ almenaŭ 20 jaroj. Se mi ne konatiĝus kun Ye, mi jam kredus, ke la ideologio de la kamparanoj radikale ŝanĝiĝis kune kun la disvolviĝo de la ekonomia reformado.

Poste mi komencis doni atenton al koncernaj raportaĵoj kaj certiĝis, ke serioza estas familia perforto. Ĝi okazas ne nur en la kamparo, sed ankaŭ en la urboj; ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en multaj aliaj lokoj de la mondo. Ĉiujare la Ĉina Virina Federacio ricevas multajn akuzajn leterojn, kaj 17% de ili rilatas al familia perforto. La Pekina Virina Federacio foje raportis per statistiko, ke familia perforto kontraŭ edzino okazas en ĉiuj socitavoloj kaj ĉiuj profesioj, kaj inter la batitaj edzinoj troviĝas ŝtatoficistinoj kaj universitataj instruistinoj. En sia libro ĉina sociologo s-ino Li Yinhe raportis, ke 95% de la suferantoj de familia perforto en Usono estis virinoj; en Francio 2 milionoj da virinoj estis molestataj de viroj; en Germanio 4 milionoj da virinoj estis torturataj de sia edzo; kaj statistiko el Israelo diras, ke la ofendataj virinoj vivas kiel en prizono izolita de la ekstera mondo. Familia perforto, kiel nekonata epidemio, infektas la tutan mondon.


KIAM FINIĜOS FAMILIA PERFORTO?

De kiam la Najroba Strategio alvokis batali kontraŭ perforto al virinoj, la registaroj kaj precipe la virinaj societoj de diversaj landoj donis pli kaj pli grandan atenton al familia perforto kaj analizis de diversaj flankoj tiun fenomenon. Iuj opiniis, ke tion kaŭzis anormala psiko de malgranda parto de la homoj. Sociologoj analizis, ke tion kaŭzis deprimiĝo post malsukceso kaj

sufokiĝo pro la klasaj diferencoj de la socio: al perforto emas tiuj homoj, kiuj ne povas atingi sian celon, aŭ troviĝas en relativa aŭ absoluta malriĉeco, aŭ loĝas en malbona domo, aŭ havas malbonajn laborkondiĉojn, aŭ ne havas okupon... Eble tiu analizo komprenigas, kial familia perforto okazas en la suba tavolo de la socio.


En Ĉinio oni ne surpriziĝas pro familia perforto dum longa tempo, influate de tradicia koncepto. Dum miloj da jaroj regis la koncepto pri absoluta rego de edzo super edzino, absoluta rego de patro super filo kaj humiliĝo de virino antaŭ viro. Kaj la slogano "Viro kaj virino estu egalrajtaj" havas historion de malpli ol 100 jaroj. Same kiel Ye, multaj rigardas batadon de edzo al edzino kiel kutiman agon, kaj ŝi eĉ sentis feliĉon, ke ŝia edzo malofte batas ŝin. Ŝia sinteno estas tipa en la kamparo de Ĉinio, malgraŭ ke ŝi havas mezgradan kleracon. Kaj en Ĉinio oni ĉiam pli akcentas la integran familion ol la individuojn. Oni kutime prenas interbatadon aŭ familian perforton kiel internan aferon de familio kaj ne intervenas en tian aferon. Cetere, ĉinoj emas kaŝi la "familiajn skandalojn". Ĉio tio estas favora al la homoj, kiuj emas al familia perforto. La batantoj rigardas sin pravaj, kaj la batitoj hontas konfesi sian ofendiĝon. Iuj suferintoj eĉ mensogas, ke bluaĵojn ĉe la okuloj faris ne la edzo, sed ili kontuziĝis en alia loko.

En la lastaj jaroj, analizante familian perforton, oni pli kaj pli ofte atribuas ĝin al malforteco de la koncepto pri la homa rajto kaj al malforteco de tiu pri leĝa sistemo, ĉar ankoraŭ multaj ĉinoj



pravigas sian batadon al la edzino. La Pekina Virina Federacio donis ekzemplon: Iu virino venis al hospitalo pro sia ostarompiĝo kaŭzita de batado de la edzo. Laboranto de la federacio kritikis ŝian edzon, kaj ĉi tiu refutis: "Ĉu mi malobservis la leĝon, ke mi batis mian propran edzinon?" Multaj el la suferintaj virinoj sin turnis al siaj kamaradinoj aŭ gepatroj por plendi aŭ peti ilian protekton, sed malmultaj el ili havis la ideon aŭ kuraĝon peti helpon de la leĝo. Mia amikino, ĵurnalistino, rakontis al mi hommortigon, kiun ŝi raportis en sia ĵurnalo:

Kamparanino en Sichuan-provinco faris dekojn da hako al sia edzo, ĉar ŝi jam ne povis elteni lian kruelan batadon al ŝi kaj la filino dum longa tempo. Ŝi estis kondamnita al morto. Ĉiuj konantoj de ŝia sufero proparolis por ŝi, petante moderigi la kondamnon al ŝi. Kaj ŝi konis la vorton "leĝo"



en granda tristo.

KIEL HELPI LA MALFORTAN SEKSON?

Analize ĝis la fino, suferantoj de familia perforto estas malfortuloj. Ili bezonas prizorgon kaj helpon de la tuta socio rilate la spiriton, korpon kaj materialon.

Multaj homoj miris: Kial tiuj molestataj virinoj vole-nevole restas en la hejmo plena de perforto?

La respondo estas, ke ilia memfido estis frakasita de perforto. Enketo montras, ke malvola tolero kaj inertece estas tipaj karakterizaĵoj de la turmentataj edzinoj. Batiĝo de virino havas tri stadiojn: Ĉe la komenco de batado ŝi surpriziĝas kaj penas eviti baton, poste ŝi teruriĝas kaj ĉiamaniere penas plaĉi al la edzo, kaj fine ŝi deprimiĝas kaj riproĉas sin mem. Batado al virino kaŭzas vundon kaj eĉ morton kaj kondukas al imitado de posteuloj. Ofte okazas, ke ankaŭ la infanoj estas molestataj kune kun la patrino. Kiam ili elkreskas, ili ankoraŭ vivas en tia situacio.

Por likvidi perforton kontraŭ virinoj, la ĉina registaro alprenis jenajn rimedojn:

nur post sia enkarceriĝo.

Fakte ŝi jam multe penis por ŝanĝi la konduton de sia edzo.

Ŝi vane petegis lin kaj ankaŭ liaj gepatroj, la najbaroj kaj la vilaĝestro ne povis deadmoni lin de la oftega batado. Ŝi diris, ke ŝi ne volis mortigi lin, sed ŝi havis neniun alian elirejon, ĉar ŝi jam ne povis elteni plu la kruelaĵon de la edzo. Hakante lin, ŝi eĉ ĝojis, ke finfine ŝi kaj la filino estos liberigitaj.

Mi kaj mia kamaradino dronis

Unue, emfazi la socian moron respekti kaj protekti la virinojn kaj oponi kontraŭ diskriminacio al la virinoj, kondamni kaj puni ĉian perforton atencantan la virinojn.

Due, kompletigi specifajn, preventajn kaj administrajn leĝon, sisteman regularon kaj justician kontrolan sistemon, amplekse legalizi la defendon de la virinaj rajtoj.

Trie, fortigi al la virinoj la konscion pri leĝa sistemo, kuraĝigi ilin sin defendi per leĝa rimedo kaj levi ilian povon kontraŭ perforto.

Kvare, la registaro kaj la neregistaraj organizoj devas doni grandan atenton al la plendo kaj akuzo de la virinoj, helpi la molestatajn virinojn solvi malfacilojn kaj preparoli por ili. En la nuna socio de Ĉinio parto de la turmentataj virinoj havas malgrandan enspezon, tial ili ne povas facile akcepti eksedziĝon, escepte se ili havas elirejon. Se ili eksedziĝos, ili perdos vivrimedojn. Tiu homgrupo plej urĝe bezonas helpon de la socio krom la leĝa helpo.

Por moderigi kaj fine likvidi familian perforton, estas necese altigi la kvaliton de ĉiuj individuoj. Oni devas laŭdi la tradician moralon de reciproka respekto kaj reciproka amo. La virinoj devas esti memrespektaj kaj memstaraj kaj esti kuraĝaj kaj saĝaj en sindefendo per la leĝo. ■

Varba informo

Nun la Beijing-a Konkorda Universitato bezonas du anglajn instruistojn el fremdlandaj esperantistoj. Varbito povos akiri 200 usonajn dolarojn monate kaj senpagajn manĝaĵojn kaj loĝejon. Bonvolu korespondi kun s-ro Xie Longfei.

Retpoŝto: Bj-cu@263.net aŭ Esperanto@263.net

Tel.: +86-10-6974 0940

Fakso: +86-10-8970 8173

KOREKTO

Legu la dua de dekstre anstataŭ la dua de maldekstre ĉe bild-klarigo, p. 5, novembra numero, 2000.

La Red.

Esperanto kaj mi

Nia hejmo konservas multe da Esperantaj libroj kaj gazetoj. Kiam mi estis 14-jara, mia mondkoncepto formiĝis kaj la idealo de Zamenhof forte altiris min. Tiam mi eklernis Esperanton.

de YE NIANXIAN

YE Junjian (Cicio Mar) estas mia patro, kiu plej frue verkis romanon en Esperanto en Ĉinio. Nia hejmo konservas multe da Esperantaj libroj kaj gazetoj. Kiam mi estis 14-jara, mia mondkoncepto formiĝis kaj la idealo de Zamenhof forte altiris min. Tiam mi eklernis Esperanton.

Mi lernis la lernolibron "Elementa kurso de Esperanto" eldonitan en 1962, kompilitan de Venlo Fon, veterana ĉina esperantisto, kiu estis bona amiko de mia patro. La patro diris al mi: "Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito (1937-1945) li havis nenion alian krom nura vesto, sed li aktive propagandis la rezistmiliton kaj Esperanton." Venlo Fon kompilis ankaŭ "Plena vortaro Esperanta-ĉina", en kiu kolektiĝis multe da vortoj, kiuj ĉiam helpas min koni la okcidentan kulturon. En la prefaco de la lernolibro li diris, ke Esperanto ne estas gepatra lingvo de iu ajn nacio, ĝi devas esti komuna lingvo de la homaro. Ĝia scienca gramatiko kaj ĝia bela idealo estas utilaj por saĝigi la homaron.

Krom lerni la lernolibron de Venlo Fon, mi ankaŭ legis la libron "Esperanta skizo" verkita en 1920 de Hou Jue, ĉina erudiciulo kaj profesoro. En la libro li skribis: "Nia idealo estas interkompreniĝo kaj elimino de rasa diskriminacio. Kial la homaro bezonas Esperanton? Per ĝi diversaj landoj kaj nacioj povas

sin reciproke kompreni kaj kulturŝanĝi por disvolviĝo de la homaro."

Lerninte la lernolibrojn, mi eklegis Esperantajn legaĵojn kompilitajn de Tikos. En la legaĵoj estas eseoj kaj fabloj kun filozofieco kaj humuro, kaj famaj poemoj kaj traktaĵoj pri Esperanto, kiel tiuj de Zamenhof, Privat, Julio Baghy, Sandor Petofi, Shakespeare, Heine... Nun ili ankoraŭ instruas min. Ankaŭ Tikos estis bona amiko de mia patro. Antaŭe li laboris en banko kaj ofte financis kelkajn esperantistojn. Post 1949 li fariĝis profesia esperantisto. En la 70-aj jaroj li kolektis monon ĉe esperantistoj de Pekino por mimeografi la librojn "Poemoj de Tang-dinastio", "Rakontoj" kaj "Interesaĵoj de la mondo". Tikos,



La aŭtoro


kiu estis optimisma, kun longa barbo kaj milda rideto foje-foje aperas en mia memoro.

La supre menciitaj kvar personoj bone konis la orientan kaj okcidentan kulturojn kaj senegoisme kontribuis al Esperanto. Bedaŭrinde, ili jam forpasis, sed ĉiam vivos en mia koro.

Mi estis sociscienca esploristo. Iutempe mi legis esperantaĵojn en la hejmo kaj faris notojn en Esperanto.

Mi korespondis kun esperantistoj de Ĉeĥio, Pollando, Ganao, Ukrainio, Usono, Britio kaj Japanio. Ni prezentis nian vivon, laboron kaj pensojn, kaj interŝanĝis pejzaĝajn poŝtkartojn, fotojn kaj legaĵojn. Mi korespondis kun germana elementlerneja instruisto, kiu informis min, ke lia lernantino kuŝis en la hejmo pro grava malsano kaj volis bildojn de Ĉinio. Mi tuj sendis al ŝi ĉinajn por-infanajn poŝtkartojn. Ŝia patrino baldaŭ sendis al mi dankleteron. Mi deziris, ke la knabino baldaŭ resaniĝu kaj fariĝu esperantistino.

Du Esperantaj libroj profunde impresas min. Unu estas donacita de ĉeĥa korespondamiko, "La travivaĵoj de la brava soldato Shvejk dum la mondmilito" verkita de klasika verkisto Jaroslavo Haŝek de Ĉeĥio. La libro humure mokas la Unuan Mondmiliton kaj montras acidan optimismon. La alia estas donacita de mia patro, "Sinjoro Tadeo" verkita de granda pola poeto Adam Mickiewicz. Ĝi bone



La aŭtoro (la 3-a de dekstre) kaj aliaj e-istoj

priskribas, kiel poloj batalis kontraŭ la aŭtokratio de caro, por sendependeco de sia nacio. Legante ni ŝajne persone spertas. Mickiewicz estis bona amiko de Puŝkin. Ili ambaŭ batalis kontraŭ la aŭtokratio de caro kaj posedis bonan literaturan lingvon. Iliaj verkoj estis bone tradukitaj en Esperanton.

tradicion por plisciencigi kaj plibeligi Esperanton.

Ekde la 80-aj jaroj Ĉinio praktikas la politikon de reformado kaj pordmalfermo. Mi kontaktis alilandajn esperantistojn, kiuj vizitis Ĉinion. Sed bedaŭrinde pro limigo de tempo ni ne povis multe diskuti pri la socio kaj

Por sia "Unua Libro" Zamenhof tradukis famajn literaturaĵojn en bela Esperanto kaj poste ankaŭ aliaj esperantistoj sekvis lin. Sed nun iuj naciaj lingvoj tendencas al trivialeco kaj pro nesciencaj idiomaĵoj oni ofte miskomprenas unu alian. Esperantistoj devas heredi sian

vivo. Mi ĉiam memoras la neforgeseblan tempon.

Kiel membro de la Pekina Esperanto-Asocio, mi ĉiam partoprenas ĝian aktivadon kaj nun respondecas pri redaktado de "Verda Pekino", organo de la asocio. Ni ne nur priokantas kaj diskutas Esperanton, sed ankaŭ uzas ĝin en la ĉiutaga vivo. Zamenhof diris: "La amikoj de la ideo de lingvo internacia, konsciante, ke teoria disputado kondukas al nescio, kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika..." Mi prezentis mian opinion al Sabira Stahlberg, redaktorino de "Kontakto". Ŝi konsentis kun mi kaj diris en sia letero: "...nia bulteno pli proksimumas la realon kaj portas utilan scion. Jes, tio gravas! Gravas ankaŭ ke nia aktivado per Esperanto estu proksima al la socio kaj utilu al ni mem, kaj al ĝi." Por disvolvo de Esperanto ni devas uzi ĝin en la reala vivo. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

★ Liu Xiaoli, 21-j. studentino, dez. kor. Esperante, angle, japane, germane kaj hispane, interesiĝas pri filozofio, fiziko, komputeriko, vojaĝo, muziko, pentrado, filatelo ktp. Adr.: 535 Yiyuan Jianyanke, 418008 Huaihua, Hunan, Ĉinio.

★ Jin Ansheng kaj Jin Zhimin dez. kor. Esperante, angle kaj ĉine, interesiĝas pri ĉinaj medicino kaj *gongfu*-o. Adr.: 244 Hongxing Zhonglu, 418008 Huaihua, Hunan, Ĉinio.

★ Fang Hong, 30-j. anglalingva instruistino, kaj Gong Hui, pentristo, dez. kor. Esperante, angle kaj ĉine kaj interŝanĝi spertojn pri instruado, pentrado kaj filatelo. Adr.: P.O. Kesto 2, Cheku CDCF, Chengdong Shichang, 418000

Huaihua, Hunan, Ĉinio.

★ Gong Zhi, instruisto de fremda lingvo, dez. kor. Esperante, angle, ruse, japane, france, germane, arabe kaj ĉine, interesiĝas pri filatelo, lingvistiko, filozofio, medicino, muziko, belarto, komerco kaj Esperanto. Adr.: 901 Shi 22 Hao Xinglong Dongjie 2 Xiang, Dongfeng Xilu, 510180 Guangzhou, Guangdong, Ĉinio.

★ Xiao Ai, 16-j. lernanto, dez. kor. Esperante, angle kaj ĉine, interesiĝas pri la angla lingvo, matematiko, pianludo, sporto, filatelo kaj komerco. Adr.: p/a Xiao Wuyu, Waiwen Shudian 4 Lou, Beijing Lu, 510030 Guangzhou, Guangdong, Ĉinio.

★ S-ro Zhao Yu, 63-j., dez. interŝanĝi kun tutmondaj esperantistoj Esperantajn gazetojn kaj librojn. Adr.: 162-16 Zhaoxiajie Beixiang, 458000 Hebi, Henan, Ĉinio.

★ Andoni Hierro, 36-j. verkisto, volas korespondi pri literaturo. Adr.: Pl. Xaho, No 1-5°-A, 48940 Leioa - Vizcaya, Hispanio.

Ĉinio – lando malproksima kaj proksima



La aŭtoro

de VLASTIMIL KOCVARA (Ĉeĥio)

EKZOTIKAJ landoj logis min jam en mia infanaĝo. Sed kiajn eblecojn havis malriĉa vilaĝa knabo en la mezo de Eŭropo? Mi tiam vivis kun la gepatroj kaj la pliaĝa frato en ne tro granda komunumo kaj mia horizonto finiĝis ĉe rando de la arbaro proksima de nia domo. Tamen mi en intimaj momentoj vojaĝis almenaŭ mense — super buntaj, ofte eĉ iom malpurigitaj dentumitaj paperetoj, kiujn al mi havigis la frato. Ja — estis tio poŝtmarkoj, kies mistero kaj ĉarmo min jam tiam kaptis. Sur kelkaj mi vidis diversajn ornamaĵojn, strangajn drakojn kaj por mi tute nekutimajn bildoliterojn. Tiam mi ne sciis, ke tio estis miaj unuaj ĉinaj poŝtmarkoj.

Pasis jaroj kaj poste venis la jaro 1949. Mi kun la familio jam loĝis en urbo kaj el komunikiloj mi ricevadis unuajn informojn pri evoluo de la mondo. Komence sporade, poste pli ofte oni alportis informojn pri la nova ŝtato, kiu aliris al revolucia vojo de popola ŝtatopotenco kaj kiu aliĝis al socialisma mondoparto. Temis ja pri popola Ĉinio. Post nelonga tempo mi renkontis la unuajn poŝtmarkojn de tiu ĉi ŝtato. Ili tute diferencis de tiuj, kiuj jam longe kuŝis en mia albumo — sed ili tamen enhavis ion misteran, ion ekzotikan — subtilajn bildojn, desegnititan nomon de la ŝtato, plaĉajn ornametojn. Ili impresis vere gracie kaj ne ordinare. Ekhavinte eblecon aboni ilin en filatela vendejo, mi eĉ ne momenton hezitis. Kaj novaj sendaĵoj al mi portadis novajn revojn kaj mi

povis ekkompiladi imagon pri vivo, historio kaj kulturo en tiu ĉi malproksima lando.

Enirinte en puberan aĝon mi ekinteresiĝis pri poezio kaj mi serĉis novajn, ĝis nun netrasentitajn impresojn. De mia instruisto mi eksciis pri la poemlibro “Kantoj de malnova kaj nova Ĉinio”. Ĝi baldaŭ venis en miajn manojn — kaj hazarde en belega eldono kun ĉarmaj ilustraĵoj de Qi Baishi. Kaj tiuj versoj! Miraklo! Majstraj tradukoj de la fama ĉeĥa poeto malfermis al mi impresivan mondon de ĉinaj geniuloj Li Bai, Du Fu, Bai Juyi, Wang Wei kaj aliaj. Mi renkontiĝis kun eksterordinara emocio, liberaj versoj plenaj de luna brilo, de nebulaj vualoj, de birda pepado kaj akvolirlado verŝis mian animon kiel saniga balzamo. Mi kelkfoje relegis la libron — sed ĝi ne plensatigis min. Mi komencis vizitadi librovendejojn kaj serĉis pluajn ĉinlingvodevenajn librojn. Iom post iom la ĉina anguleto de mia biblioteko fariĝis neignorebla — nomoj viciĝis al nomoj kaj titoloj: Pu Songling, Lusin, Guo Moruo, Mao Dun, Historietoj el antikvaj bazaroj kaj foirejoj, Simio Reĝo... Dekoj da rimarkindaj libroj, kiuj por mi prezentis skriban kulturon de Ĉinio.

Tamen miaj scioj havis multajn mankojn, ĉar ili dependis nur de tio, kion disponigis al mi la ĉeĥlingva libromerkato.

Mian sopiron pri la pli intima kontakto kun Ĉinio kaj ĝia popolo kontentigis Esperanto. Ĝin mi studis jam kelke da tempo, kiam oni enmanigis al mi oferton de Esperantlingvaj gazetoj. El inter dekoj da titoloj okulfrapis min la revuo “El Popola Ĉinio”. Tuj

mi ĝin abonis kaj fariĝis ĝia regula

leganto. Des pli, ke tiutempe ankaŭ ĝia prezo estis modera. Baldaŭ mi en la manoj premis ĝian unuan ekzempleron. Unuavide impona impresio: bunta enhavo, interesaj artikoloj, allogaj fotografiaĵoj, literaturaĵoj el antikva kaj moderna ĉina arto, eĉ la filatela angulo, kiu ofte informis pri daŭre ĉarmaj ĉinaj poŝtmarkoj...

Mi legis kaj songis, mi reabonis, ripete mi foliumis ĉiujn numerojn de ĉi riĉkolora magazino. Dekojn da jaroj mi restis fidela leganto de gazeto, kiu konatigis min kun ĉiuj aspektoj de Ĉinio kaj ĝia popolo.

Tamen — lastaj jaroj alportas al mi ioman seniluziigon... Mi povas vidi grandan progreson, kiun la ĉina popolo atingas en teknologio, konstruado, vivnivelo... Mi ege estimas ĉinojn pro rezultoj, kiujn oni prezentas sur paĝoj de “El Popola Ĉinio”. Sed tiu modernigo, tiu grandskala evoluo profunde influas karakteron de por mi ekzotika antikva lando. La pejzaĝo, ĉefe en grandaj urboj, ekaspektas ĉu usone? ĉu japane? ĉu eŭrope? La tradiciaj moroj malaperas... la vivo en Ĉinio alproksimiĝas al tutmonda aspekto.

Kaj la ĉinoj mem?

Mi kredu, ke ili ne multe ŝanĝiĝis, ke ili ankaŭ en la nuna moderna kaj pretendema epoko restas modestaj, laboremaj, iom misteraj, bonkoraj kaj gastamaj, profunde enradikiĝintaj en sia naskiĝlando, kiu apartenas al kreintoj de fundamentoj de tuthomara kulturo. ■

Karaj rememoroj

de CVETANKA KOSTOVA
(Bulgario)

Karegaj gesamideanoj de EPCĈ, Vi inde plenumis vian devon, pro kio mi kore gratulas vin. Viaj grandaj sukcesoj estas vera festo ne nur por EPCĈ, sed ankaŭ por la tuta esperantistaro. La revuo montriĝis unu el la plej reprezentantaj inter ĉiuj Esperantaj periodaĵoj: riĉa kaj varia laŭ temoj, altnivela, luksa kaj aparte utila. El ĝi ni ĉerpas abundajn sciojn kaj konojn pri unu el la plej progresantaj landoj en la mondo. Pere de ĝi ni juĝas pri la rapide antaŭeniranta ĉina E-movado.

Kelkiam eĉ la plej timemaj revoj de la homo realiĝas. Tiel okazis same kun mia partopreno de la 71-a Universala Kongreso en Pekino, 1986. Mi unuafoje vizitis similan kongreson. La signifo kaj la efiko de tiu ĉi alta forumo ne transdoneblas per vortoj. Ili estas nur traviveblaj. Okaze de la 50-jariĝo de EPCĈ mi skribas mian travivaĵon unue por esprimi mian altan pritakson



La aŭtoro

de via revua jubileo, due por dividi kelkajn impresojn kaj pensojn, kaj trie por esti utila per mia malgranda sperto.

Vi povas imagi la emociojn de homo, unuafoje droninta en eksterordinara atmosfero.

Dum la kongresaj tagoj mi multe vidis kaj eksciis. Sed plej multon mi travivis. Ĉu mi povas forgesi la grandiozan ĉefurbon Pekino kaj la faman Tian'anmen-placon kun Maŭzoleo de Mao Zedong?

Mi longe miregis kaj admiris la ununuran en la mondo Imperiestran Palacon. Ĝi fakte estas urbo-historio — viva atestanto de la glora pasinteco de majesta Ĉinio.

La Somera Palaco tuj kaptis mian animon. Mi plezure promenadis kaj ĝuis ĝian belecon kaj kvietecon.

Mi multfoje estis kortuŝita de la atento kaj bonkoreco de diversaj ĉinoj. Multnombraj estis la okazoj, kiam nekonataj ĉinoj, eĉ neesperantistoj, volonte helpis min.

Mia malgranda lando donis al la mondo multajn operkantistojn kiel T. Mazarov, B. Hristov, N. Gjurov, P. Kabaivanska kaj V. Damjanov. Mi tre ŝatas operon. Pekina prezentado superis ĉiujn miajn atendojn. De la komenco ĝis la fino de la spektaklo mi estis ĉarmita, ravita de ĉio vidita kaj aŭskultita: kaj de la fabelaj dekoroj, kaj de la mirindaj kostumoj, de la dia kantado kaj ludo. Ĉu realo aŭ fabelo?! Kiel infano mi ne volis, ke tiu ĉi fabela sonĝo havu finon.

Ordinara demando en Bulgario al ĉiu, kiu vizitis Ĉinion, estas: "Ĉu vi vidis la Grandan

Muron?" Certe sekvas la nobla ekkrio: "Ho, feliĉulo!" Vere, tia feliĉo estas enviinda. Ni iris, staris, ĉirkaŭrigardis, miris kaj admiris, pensis kaj meditis. "Ne, neniam venkota, ĉiam antaŭeniranta estos la lando, kreinta la Grandan Muron." Ni rapidis eternigi tiujn ĉi feliĉajn momentojn kaj fotis, fotis. Ĉio vekas en mi karajn rememorojn pri la novaj geamikoj, lokoj kaj la fama ĉina kuirarto.

Nun pri mia malgranda sperto.

Kvar jarojn post mia emeritiĝo mi feliĉe tuŝis la internacian lingvon. Ĝi tiel obsedis min, ke post sesmonata lernado mi sukcese fariĝis diplomita instruistino. Tio estis en 1982. De tiam ĝis nun mi gvidis 20 kursojn: por komencantoj, progresintoj, fakajn kaj naciajn.

Esperanto malkovris novan paĝon en mia vivo, donis al mi sencon kaj celon. Pere de ĝi mia mondo plivastiĝis, mia domo pliriĉiĝis, ĉar niaj gastoj estis Esperantaj aktivuloj, kiel Tuka el Brazilo, Jozefo el Koreio, Koralo el Ĉinio, Sajonĝi el Japanio, Martino el Hispanio kaj Gunar Nelson el Svedio. Tio estis por mi la plej feliĉa tempo, kiam mi povis gastigi karajn geesperantistojn.

Mi parolas pri tio ne por fanfaroni, sed por ilustrati la penson, ke neniam estas malfrue lerni kaj amikiĝi. Mi ĝojos, se mia malgranda sperto kuraĝigos kelkajn novajn geesperantistojn kaj junajn gepensiuulojn. La lastaj estos ne nur gepensiuuloj, sed same gepensuloj. Ju pli da kapablaj homoj ekregos Esperanton, des pli forta estos nia movado. ■

Li verkas poemon de homa vivo

Li projektis por si vojon de homa vivo post batalo inter vivo kaj morto: Sen irpovaj piedoj, sen lertaj manoj, li tamen efektivigos per sia sana cerbo revon de la infaneco — vojaĝi tra la tuta mondo.

de WANG HANPING

PRINTEMPO ĉiam estas plena de ebriiga verdeco, sed tiu de 1985 estis tute nigra sezono por Mao Zifu, ĉar trafika akcidento faris lin suferanto de alta paraplegio, nelonge post kiam li diplomiĝis el altlernejo. Kaj la juneco kaj la futuro pereis en momento, kaj li dronis en granda doloro.

Sed dek jarojn post tio, en la aŭtuno de 1995, kiam mi venis de Pekino al lia hejmo en la

Informadika Kolegio de Changde, Hunan-provinco, kaj vidis lin sidanta en rulseĝo, li jam publikigis multajn Esperantajn poemojn, novelojn kaj recenzojn en ĉinaj kaj alilandaj Esperantaj gazetoj, kaj per siaj poemoj “La tuta vivo” kaj “Fendo” li gajnis premion “Nova talento” en la beletra konkurso de UEA tiujare. Oni povas diri, ke li jam sin turnis el la abismo de malespero, kaj ĝuste estas Esperanto, kiu kondukis lin al gaja spirita hejmo.

Rememorante la pasintecon,

Mao Zifu diris, ke li projektis por si vojon de homa vivo post batalo inter vivo kaj morto: Sen irpovaj piedoj, sen lertaj manoj, li tamen efektivigos per sia sana cerbo revon de la infaneco — vojaĝi tra la tuta mondo.

Mao Zifu estas firmvola homo. Li venkis malfacilojn neimageblajn por sanaj homoj kaj komencis memlerni Esperanton. Kriplulo, kiu antaŭe malmulte konis literaturon, verkis post dek jaroj serion da admirindaj Esperantaj literaturaĵoj. Sed antaŭ



Komputero plaĉas ankaŭ al Mao Zifu.



Mao Zifu (en rulseĝo) kun samideanoj partoprenantaj la simpozion

mia vizito al li, li neniam ĉeestis Esperantan agadon kaj renkontis nur unu esperantiston, tamen tio ne malhelpis lin kontakti kun la ekstera mondo per plumo en la mano. Post kiam mia raporto publikiĝis, multaj ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj atentis lin kaj multaj helpemaj leteroj flugis al li, kaj iuj veturis al Changde por viziti lin. Esperantistoj de Hunan-provinco fieras pro tiu samlokano kaj ankaŭ hontas, ke dum multaj jaroj ili neglektis tiun firmvolan samideanon. Ili donis al li pli multan prizorgon, kaj dank' al tio liaj cirkonstancoj estis plibonigitaj. Li estis sindonema al verkado de Esperantaj poemoj kaj gajnis beletran premion de Grabowski en 1997, kaj li aliĝis al la Esperantlingva Verkista Asocio.

La granda sukceso de Mao Zifu en la aĝo de iom pli ol 30 jaroj estis rekompencita per Esperanto-premio de literaturo en la 4-a Ĉina Kongreso de Esperanto en 1999. Tio estas laŭdo de lia elstara Esperanta literatura verkado. Liaj agoj instigis multajn neesperantistojn. "Tagjurnalo de Hunan" raportis pri li sub la titolo "Li direktas sian sorton". La raporto vekis grandan resonon kaj li estis honorita kiel eminenta junulo de Changde.

Por disvastigi la spiriton de Mao Zifu, antaŭ 2 jaroj esperantistoj de Hunan, Hubei

ĉinaj esperantistoj kaj du belgaj samideanoj.

La inaŭguro de la simpozio okazis antaŭtagmeze de la 15-a, kaj ĝin ĉeestis Mao Zifu, kiu malofte iras aliloken. Al la simpozio venis ankaŭ gvidantoj de la Popola Politika Interkonsiliga Konferenco, magistratanoj kaj raportistoj de Changde. Instruisto Peng Shiman, kiu multe prizorgis kaj helpis Mao Zifu en la pasintaj dekelkaj jaroj, faris prelegon sub la titolo "Homo, kiu ne klinas sian kapon al la sorto" por konigi lian travivaĵon. La prelego de Mao Zifu titolita "Kion Esperanto alportis al mi" prezentis lian internan mondon, lian penson pri la homa vivo kaj lian persistan strebadon por la afero de Esperanta literaturo.

La prelego de Hu Guozhu "Nova talento en nova jarcento" estis vivoplena leciono pri la Esperanta literaturo, analizante la personecon de Mao Zifu, liajn verkojn kaj la disvolviĝon de la ĉina E-movado. Li dividis liajn poemojn en tri kategoriojn: facile komprenebla, ne tiom facile komprenebla kaj malfacile

komprenebla.

Estis la unua fojo en la historio de la ĉina E-movado, ke oni okazigis simpozion por juna esperantisto. Tio havis profundan signifon kaj influon. Esperantistoj de Hunan decidis bone utiligi tiun ŝancon por diskonigi Mao Zifu al la tuta socio kaj ankaŭ Esperanton. Komence de septembro raportisto de la televida stacio de Hunan-provinco intevjuis lin kaj telesendis la programon. En la televida stacio li renkontis siajn kunlernantojn kaj instruistojn, kiujn li ne vidis dum pli ol dek jaroj. Kun larmoj en la okuloj li diris al sennombraj televidantoj, ke estas Esperanto, kiu restarigis lin en spirito.

Mao Zifu diris, ke li fieras pro sia esperantistiĝo kaj li devas fari pli da kontribuo al la disvolviĝo de E-movado. Antaŭ nelonge li transprenis la gravan taskon redakti la literaturan gazeton "Penseo". Nun li laboras por interŝanĝo de la ĉina kaj alilandaj kulturoj pere de Esperanta interreto. Li volas prui al la publiko la organikan kombiniĝon de Esperanto kun interreto, por ke ĉiuj homoj fariĝu membroj de la tergloba vilaĝo plena de paco kaj interkompreno.



Simpozianoj vizitantaj Mao Zifu en lia hejmo

Mao Zifu sentas feliĉon, ke li estas esperantisto. Kun Esperanto li neniam sentos solecon. ■

Poemoj

de MAO ZIFU

ĉe muzo

horloĝo faras per dekdu-silabo
poemon kun nekalkuleblaj versoj
trokee, jambe, sen stumblo

kaj paŭzo;

krepusko estas in-cezur'. diversoj
transpaŝaj ŝvebe apenaŭe glitas
kaj homo vivo-longon

pieskandas

laŭ ritmo de anapesta, amfibraka
ĝis la daktilo. flua tempo flustras.

se oni nur ne vivus palindrome!

paŝ' karambola; voĉo akcentperda.
pasion siblan dampas enklitiko.
griziĝas limeriko dioniza.

veter' sestina, kaj rondela penso.
paseo fadas en la akrostiko.

naskiĝas beb' en senfina tercino.
oldulo vagas sur la sonet-rimo...

blindulo

kiu difinas vojon tiel abstrakta?
eko kaj fino en propra
spaco nekontakta.

de ĉi tiu al tiu li

devas kalkuli la orienton
frape esplorante ĉe ĉiuj paŝoj.

en nokto pli ol vojo longa,
por li nulas stelo luno.
karesas nigran rozaron,
remaĉas li ĉian veteron.
mateno vespero samas.

ebeno alpo, unutraba ponto —
eĥo estas mondo.

frapo, frapo...
malgraŭ alies subrigardo.

falado estas por li fato, sed
neniam li falas

en kaptilon kolorhavan.
remaĉas li ĉian sperton,
karesas luman rozaron.

monte

vento skrapanta arbojn
pelis nokton en la vaston.
rojo per sibilo
somniaĝis monton.
deklive obskuris terkabano.
kato kaj oldulo ŝpinaj.

neĝas...
la forno sen flamo.
kristalaj floroj
pendis sur la branĉoj

de pinoj, kiujn prizorgis
la maljunulo.

kaj la vaporo el la buŝo
la tutan korpon glaciizis.
la kato forlasis rezignacie
la ejon. kun krako
fermiĝis la pordo. tombas
do la mont'. serena la ĉielo.

al pastoro

starante sur gigantajn ŝultrojn
vi iĝas pli giganta.
proksimiĝu al zenito!
kun deziroj mi rigardas alten.

ne estas misutiligita
evangelio,
enventa nek mesaĝo.
la fonta kanto
masaĝas andante ĉian koron
en oriento
en okcidento.

en muroj konstruitaj per la krucoj
(de kiu? mi aŭ vi?!)
kristarba verdo estas vanta.
diaj vortoj — nur mobiloj
kaj de vi kaj de mi.
pluvo el ĉielo iam
plage inundas.
la fonto restu
por ĉiam sensoifiga!

Nokto

Nokto estas kvazaŭ sombra vualo
Kiu lante sinkas el la ĉielo
Montoj, arboj kaj mia silueto
Ĉia sceno dronas en la malhelo

Svarmo de la steloj silente flagras
Nun ĝis la zenito la luno soras
Montoj, arboj kaj mia silueto
Jam sin banas en la arĝent-lumeto

(Esperantigita de Mo Yangsheng)

Bela okcidenta Hunan

Ĝi estas ĉirkaŭita de montoj kun prosperaj arboj kaj tranĉita de Tuojiang-rivero. Ĉe la rivero staras multe da lignaj surfostaj domoj. Ĉe la matena krepusko sampanoj ekcirkulis sur la rivero. Tiam multe da homoj kun bambua korbo sur la dorso transiras la riveron kaj mjaŭ-aj virinoj eklavas vestojn.

de WANG HANPING

MULTE da ĉinoj konas la okcidentan Hunan pere de verkoj de fama ĉina verkisto Shen Congwen. De liaj verkoj oni scias, ke la okcidenta Hunan, loĝloko de nacimalplimultoj, havas belajn naturajn pejzaĝojn kaj interesajn naciajn morojn. Sekve de tio la loko forte impresas ĉiujn vizitantojn.

Aŭguste ĉi-jare, mi kaj miaj amikoj vizitis la lokon laŭ la ĉarma turisma itinero kaj estis ravitaj de la belaj pejzaĝoj.

TUĜJA-AJ MOROJ ĈE MENG Dong-RIVERO

La okcidenta Hunan estas unu el la ĉefaj loĝlokoj de tuĝja-oj. Tie vivas 2.5 milionoj da loĝantoj, el kiuj 0.9 miliono estas tuĝja-oj. En la pasintaj jarcentoj la urbeto Sicheng estis politika, religia kaj kultura centro de la tuĝja-a loĝloko en la okcidenta Hunan.

La pitoreskejo de Mengdong-rivero distancas de la fama ŝtata arbara parko Zhangjiajie je unu-hora trajna veturado. La pitoreskejo konsistas el 5 partoj, inkl. de Mengdong-rivero, antikva urbeto Wangcun, urbeto Sicheng kaj primitivaj sekundaraj arbaroj de Xiaoxi. Mengdong-rivero longas pli ol 200 km. Ĝia supra parto estas mallarĝa kaj la fluo rapida, ambaŭflanke de la rivero prosperas verdaj arboj, apike staras krutaĵoj, ĉarmas akvofaloj kaj fontoj. Flosado sur tiu longa

galerio estas animskua, tamen sekura. Ĝia malsupra parto fariĝis iom post iom larĝa kaj tie la akvo estas spegule ebena, ambaŭflanke de ĝi faŭkas multaj grotoj, kie viglas sovaĝaj makakoj, iafoje aŭdiĝas laŭta kanto de tuĝja-aj fiŝistoj. Ĉarmas tie primitiva, natura pejzaĝo.

La baseno de Mengdong-rivero estas koncentre loĝata de tuĝja-oj. Tie vidiĝas diversaj kuriozaj moroj de tuĝja-oj, kiaj danco de mansvingado, plora kanto ĉe edziniĝo k.s. La mil-jara urbeto Wangcun ja estas tipa tuĝja-a urbeto ĉe la rivero. La urbeto famiĝis tra la tuta lando pro la filmo "Furong-urbeto". Dorse ĝi apudas al montoj kaj fronte rigardas al rivero. Ĉe la rivero sur la montodeklivoj staras tuĝja-aj surfostaj domoj. De la kajo direktas sin rekte al la montosupro ŝtupara strato el bluaj ŝtonplatoj. En la butikoj ambaŭflanke de la strato vendiĝas diversaj tuĝja-aj brokatoj kaj aliaj

metiartaĵoj. Tie oni povas ne nur ĝui la belajn pejzaĝojn, sed ankaŭ viziti la tuĝja-ajn domojn kaj viziti la urbeton Sicheng.

La urbeto Sicheng estis administrejo de la tuĝja-aj regantoj dum multaj generacioj. Jam en la 12-a jc. ĝi estis centro de tuĝja-oj en la okcidenta Hunan. En 1729 la reg-sistemo estis abolita kaj la urbeto fariĝis iom post iom depresia. Tie nun ankoraŭ konserviĝas halo por kultado, ŝtona arkaĵo, antikvaj tomboj kaj multaj aliaj historiaj objektoj. Oni diras ke tie estas tipa muzeo pri tuĝja-oj.

EN MJAŬ-AJ VILAĜOJ

En la areo de 15 000 kvadrataj kilometroj de la Tuĝja-kaj Mjaŭ-nacia Aŭtonoma Subprovinco de la okcidenta Hunan vivas 25 nacioj. La nombro de mjaŭ-oj, kiu konsistigas trionon de la tuta loĝantaro, estas malpli granda nur



Ĉe la rivero Tuojiang
Foto de ZHENG SHIHUA





La gubernia urbo Fenghuang
Foto de ZHENG SHIHUA



En ŝtonplata vilaĝo
Foto de ZHANG JIZHEN



Ŝoseo serpentumanta sur monto
Foto de XIANG MINHANG



Êe pramejo
Foto de ZHENG SHIHUA



Kamplaboro
Foto de XIANG MINHANG

ol tiu de la tuĝja-*oj*. Je 200 km sude de Wangcun estas Jishou, ĉefurbo de la subprovinco. Ni venis en la mjaŭ-an vilaĝon Dehang, proksiman al la urbo.

Dehang nun estas vilaĝo de mjaŭ-nacia kulturo. Tie estas akvofalo kun la plej granda niveldiferenco en Ĉinio. Krome, tie estas ankaŭ belaj idiliaj pejzaĝoj kun apartaj mjaŭ-aj moroj. La mjaŭ-aj knabinoj bonvenigas gastojn per tre interesa maniero. Ili baras la vojon al la gastoj ĉe ilia endomiĝo kaj kantas al ili. Ĉe la tablo la knabinoj foje refoje kantas, proponante vinon al la gastoj, de kio la gastoj facile ebriiĝas de la modesteco kaj gastamo de la gastigantoj. Samkiel la aliaj nacioj, la mjaŭ-*oj* ŝatas peklitajn legomojn, ĉar ili opinias, ke tio estas la plej bona manĝaĵo por regali la gastojn.

La mjaŭ-*oj* estas lertaj en kantado kaj dancado. Ili faras diversajn aktivadojn en festotagoj. Ĉiujare en la Aŭtuna Festo la mjaŭ-*oj* en belaj vestoj kantas, dancas kaj ludas trapezon. Tiam la gejunuloj ameme parolas kun sia amat(in)o. La trapezo rondiras



Kantado sur trapezo Foto de MI YUEJIN


kiel turnata ŝpinrado. Post danco oni kantas kaj denove ludas trapezon. Tiamaniere la mjaŭ-*oj* esprimas sian deziron pri riĉa rikolto en aŭtuno kaj pri tiu en la venonta jaro.

La alia tradicia aktivado de mjaŭ-*oj* estas supreniri glavan ŝtuparon, kiu konsistas el ligna stango kun 36 glavoj. Ĉiu glavo estas enigita kun la klingo supren. Buntaj flagoj flirtas sur la ŝtuparo. Ili simbolas esperon kaj venkon. Oni komencas la grimpadon de la unua ŝtupo. Ju pli supre, des pli akra estas la glavo. Kaj krome, la grimpantoj devas prezenti diversajn danĝerajn movojn. Tio ja estas ludo de bravuloj.

BELA MONTURBO

Fenghuang, laŭdata kiel la plej bela urbeto en Ĉinio, situas je 50 km sudokcidente de Jishou. Tie koncentre loĝas mjaŭ-*oj*. S-ro Shen Congwen ja naskiĝis en tiu urbeto.

Hodiaŭ la urbeto ankoraŭ elspiras trajtojn de la dinastioj Ming kaj Qing. Ĝi estas ĉirkaŭita de montoj kun prosperaj arboj kaj tranĉita de Tuojiang-rivero. Ĉe la rivero staras multe da lignaj surfostaj domoj. Ĉe la matena krepusko sampanoj ekcirkulis sur la rivero. Tiam multe da homoj kun bambua korbo sur la dorso transiras la riveron kaj mjaŭ-aj virinoj eklavas vestojn. En la urbeto plejparto de la stratoj estis pavimitaj el bluaj ŝtonplatoj. Butikoj de vakse tinkturitaj



Flosado sur la rivero Mengdong Foto de LUO WEI

ŝtofoj, paperaj floroj, arĝentaj ornamaĵoj kaj prestinkturitaj ŝtofoj staras unu apud alia. En la malgranda urbeto vidiĝas pli ol cent antikvaj konstruaĵoj, kiaj palaco, halo, pavilono kaj pagodo. Tie estas bone konservataj ne nur la antikvaj urbomuroj, sed ankaŭ urbaj pordegoj kaj turoj.

Tie vidiĝas ankaŭ grandaj muroj etendiĝantaj en la gubernio. La muroj, 192 km. longaj, estis konstruitaj en la 17-a jc. Ili estis konstruitaj, laŭ decido de la regantoj de la dinastioj Ming kaj Qing, kontraŭ ribelo de mjaŭ-*oj*. La muroj serpentumas sur altaj montoj kun multe da fortikaĵoj kaj pasejoj. Laŭ la geografia situo ili povas esti nomataj la Suda Granda Muro kompare kun la mondfama Granda Muro en la nordo de Ĉinio. La Suda Granda Muro ja estas atesto de la mjaŭ-a historio. Ĝi jam travivis pli ol 300 jarojn, tamen oni ankoraŭ povas vidi ĝiajn restaĵojn. Survoje de Jishou al Guizhou estas multe da vilaĝoj, kiuj rememorigas pri ĝia brila historio. ■



Bonveno al gastoj per vino
Foto de ZHENG SHIHUA



Mjau-aj knabinoj brodantaj zonojn
Foto de XIANG MINHANG



Floroj
Foto de XIANG MINHANG

● VESTOJ DE CINJU NACIOJ

Vestoj de de'ang-oj



Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG

De'ang estas unu el la 56 nacioj de Ĉinio. Ĝiaj 21 000 membroj loĝas en Dehong, Lincang kaj aliaj lokoj de Yunnan-provinco, sudokcidenta Ĉinio.

La vestoj de de'ang-oj, faritaj el nigra aŭ blanka tola ŝtofo, estas similaj al tiuj de aliaj nacimalplimultoj en la samaj lokoj. La virinoj portas mallongan veston butonumatan en la mezo kaj longan jupon, kaj la viroj saman veston kaj mallongan, lozan pantalonon.

La de'ang-oj, ĉu viroj ĉu virinoj, portas

grandajn orependaĵojn kaj arĝentan kolringon, malsame kiel aliaj nacimalplimultoj. La virina vesto havas kvadratajn arĝentajn butonojn, kun arĝentaj rindaĵoj kaj ruĝaj veluraj globejoj sur la brusto. Oni diras, ke la brustaj arĝentaĵoj montras riĉecon.

Por la de'ang-oj ne gravas kapornamo. La maljunulinoj portas nigran tukon volvitan sur la kapo, la junulinoj alian tukon nevolvitan kaj la viroj ĉapelon. Mi iam demandis mezaĝulnon, kial ŝi portas modestan kapornamon. Ŝi diris, ke la kapon vidas la ĉielo kaj la bruston la homoj.






Saluto



Geamantoj



Oreipendaĵo



Virino kaj infano en naciaj vestoj



Brustornamo de junulino



Beligado

ĈINIO

● La 26-an de oktobro okazis la kunsido de la 6-a Konsilantaro de la Ĉina E-Ligo (ĈEL), kiun ĉeestis ĉ. 20 konsilantoj el Pekino. La kunsido diskutis pri la aktuala situacio de la ĉina E-movado, laboro de ĈEL, plibonigo de la revuo "La Mondo" kaj invito de la 89-a UK en 2004 al Pekino.

BULGARIO

● La 8-10-an de septembro 2000 okazis la 51-a Kongreso de la Bulgara Esperanto-Asocio en la historia kaj pitoreska urbo Karlovo. Ĝin partoprenis 85 delegitoj kaj gastoj el Ĉinio, Serbio, Germanio kaj gravaj reprezentantoj de la Urbestrejo. Oni elektis la novan asocian gvidantaron. La estonta kongreso en 2001 okazos en belega urbo Velingrad.

(Hristo Manolov)

KROATIO

● Prezidento de Respubliko Kroatio Stjepan Mesic fariĝis en

aprilo alta protektanto de la 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb, Kroatio, en 2001. Okaze de la transpreno de tiu tasko, delegacio de Kroata E-Ligo vizitis la Oficejon de la Prezidento kaj informis kulturkonsilanton de la Prezidento pri la preparado de la kongreso. La kulturkonsilanto Zdravko Jelenovic esprimis sian pretecon helpi en la laboro de la Loka Kongresa Komitato. Li kun intereso informiĝis pri kontribuo de kroataj e-istoj por diskonigo de kroata kulturo per Esperanto.

En la Oficejo de la kroata Prezidento Mesic oficas interalie d-ro Stanko Nick, membro de Honora Komitato de Universala Kongreso de Esperanto. Prezidento Mesic dum sia maja vizito al centro pri invalidaj infanoj renkontiĝis interalie kun membroj de la Esperanta grupo.

(Spomenka timec)

MEKSIKIO

● La 5-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto okazos

de la 15-a ĝis la 21-a de aprilo 2001 en Meksiko, Meksikio. La ĉefa temo estas "Ameriko: Unu kontinento, diversaj historioj". Federacion Mexicana de Esperanto, Apartado Postal 10576, MX-06000, Mexico, D. F., Meksiko. Fakso: Michael Porter 52-5-562-4333. Retadreso: <mike@math.cinvestav.mx>. Ni invitas vin rigardi ankaŭ nian TTT-paĝon: <<http://punto-y-aparte.com/esperanto>>, kie ni aktualigas kiel eble la informojn pri la Kvina Tut-Amerika Kongreso de Esperanto. Tie vi povos aliĝi al la evento.

(Federacion Mexicana de Esperanto)

POLLANDO

● Inter la 25-29.09 okazis la sekva sesio de la Interlingvistikaj Studoj en la Adam Mickiewicz Universitato en Poznan, Pollando. Kvin novaj studemuloj (unu brito, unu belgo kaj 3 poloj) aliĝis al la grupo. Kursoj pri Esperanta literaturo, pri komunikado, pri fonetiko kaj pri kulturo konsistigis la programon. Zofia Banet-Fornalowa prezentis la E-teatran arton kaj Judita Schiller la filmarton. La sesion kompletigis la kultura programo de Arkones semajnfine: spektakloj de Jadwiga Gibczynska, Jerzy Fornal kaj de Studio "P". La partoprenantoj povis rigardi filmojn Esperante parolantajn post la enkonduka prelego de J. Schiller, aŭskulti prelegon de Z. Fornalowa pri ŝia nova libro "Familio Zamenhof". Ne mankis muziko, kantado kaj diskutoj pri la rolo de Esperanto. Dum la aranĝo la unuan fojon okazis ankaŭ du AIS-kursoj kadre de la 18-a Pola Studsesio organizita de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo.

(Bydgoszcz)




Prezidento Stjepan Mesic kaj junaj e-istoj en centro pri invalidaj infanoj

“Ĉarmaj floroj” en marfundo

Teksto kaj fotoj de ZHANG QUANYUE


Ege belas la marfundaj pejzaĝoj ĉe la insularoj Xisha kaj Nansha en la suda ekstremo de Ĉinio, kun koraloj en formoj roza, peonia, pava kaj cervokorna.

Xisha kaj Nansha estas gravaj lokoj por rifofaraj koraloj en Ĉinio. Sole ĉe Xisha-insularo troviĝas 127 specoj da rifofaraj koraloj. Tie la firma marfundo, konvena temperaturo kaj bona travidebleco de la marakvo estas idealaj por vivado de la rifofaraj koraluloj. Miloj kaj dekmiloj da koraluloj vivas kune kaj senĉese sekrecias kalkecan likvaĵon, kiu poste formas diversajn kaj buntajn koralojn multoble pli pezajn kaj grandajn ol la koraluloj mem. Ili estas ne nur mara estaĵo, sed ankaŭ ĉarma trezoro.




koraloj

Koralaj fiŝoj kaj koraloj en formo de pina branĉo




Koralaj fiŝoj kaj koraloj en
formo de arbobranĉo



Koraloj en formoj de
rokaĵo kaj cervokorno



Koraloj en formo de saliko



INDEKSO DE EPĈ 2000

	Nr.pĝ.		Nr.pĝ.
50-JARA JUBILEO DE EPĈ			
Ĉe la 50-jara jubileo de EPĈ	5.4	Post transloĝiĝo en urbeton	1.44
Gratuloj	5.5	Progresigi la okcidenton de Ĉinio	6.4
Intervjuo kun s-ro Ĉ. Ĉen	5.8	Ŝtala urbo ĉe kanjono	6.6
Rememore al la unuaj jaroj de EPĈ	5.15	La lastaj arbohakistoj	6.28
Fenestro por la legantoj	5.16	Unua vilaĝo ĉe la fonto de Yarlung Zangbo	9.6
Amo al Esperanto	5.17	Miaj kamparanaj gepatroj	9.11
Pere de la okuloj de niaj raportistoj	5.18	Kion ni vidis kaj aŭdis en Gaocheng?	9.14
"El Popola Ĉinio" kaj E-movado	5.20	Agronomia urbo en okcidenta Ĉinio	10.38
Unu jaro ĉe EPĈ	5.24	Kurantaj aferoj	1-4
Eterna memoro	5.40		6-12
Gastado ĉe esperantistoj eksterlande	5.43	KULTURO, EDUKO, SCIENCO	
Por paco kaj progreso de l' homar'		KAJ TEKNIKO	
pli vigle agu ni en solidar'! (Poemo)	5.45	Kamparano-papertondisto Zhou He	1.38
Benriĉa aktiveco de EPĈ dum 50 jaroj	5.51	Nova plano pri naturaj sciencoj de Ĉinio	2.4
Pluan longan vivon al "El Popola Ĉinio"	5.52	Chen Chuhua kaj lia hejma muzeo de tuĝja-	
Tion mi nomas neelĉerpebleco	5.53	kulturo	3.16
Estu plu firmaj viaj paŝoj	5.53	Interesaj fenomenoj en ĉinaj dialektoj	3.48
Energiaj emeritoj de "El Popola Ĉinio"	5.54	Lernejo sur ŝipoj	4.34
Verda juneco	5.56	Posedanto de rara ĉina poŝtmarko	4.44
Ĝi apartenas ne nur al Ĉinio	7.4	La origino de la ĉina civilizacio	6.36
Festparolado de Chen Yuan	7.5	Ĉu vere plezuriga lernado?	6.42
Festparolado de Zhang Qicheng	7.5	Se memoro povus engreftiĝi	7.48
Festparolado de Ragnar Baldursson	7.5	Antikva muziko de naŝi-oj	8.20
Festparolado de Gianfranco Polerani	7.6	Rekompenco por montvilaĝa patrino	8.44
Festparolado de Sabira Stahlberg	7.6	Muzikantaj ŝtonoj	9.48
Festparolado de Stanislaw Mandrak	7.7	Bela spektaklo en universitato	11.36
Gratuloj	7.14	ĈINA KULTURO	
"El Popola Ĉinio" kaj Esperantaj libroj	7.16	Kiel la ĉinoj rigardas drakon	2.6
Parolado de koroj	8.6	Ĉinaj dioj de riĉeco	4.38
Gratuloj	8.7	Ĉu konfuceanismo furoros en la 21-a jarcento?	6.38
POLITIKO			
Saluton, 2000	2.8	Ĉina ideografio, moro kaj etiketo	8.4
Makao revenis	2.20	La historio de ŝuoj de Ĉinio (I)	10.41
Retrospektive al la 10-a jarcento	4.4	La historio de ŝuoj de Ĉinio (II)	12.46
Pri elektroprovizado en Makao	7.44	LITERATURO KAJ ARTO	
EKONOMIO			
		Nubo de Yunnan (Prozaĵo)	1.32
		Du satiroj	1.39
		Versparo kaj lanterna enigmo	2.49

	Nr.pĝ.		Nr.pĝ.
La lasta milita elefanto (Novelo)	10.48	MULTNACIA ĈINIO	
Tago de Josef	11.12	Derungoj en profunda montaro	10.46
NUNTEMPA BELARTO		HISTORIAJ RESTAĴOJ	
Sentimentalaj belulinoj	3.29	KAJ ARKEOLOGIO	
Pupoj el tablotenisaj pilkoj	9.21	Serĉi antikvajn morojn de Va-nacio	6.40
Pri pentristo Zhou Zhilin	12.29	Historiaj signoj (I)	7.28
SPORTO KAJ HIGIENO		Historiaj signoj (II)	8.15
Signifoplena ora medalo	1.36	VOJAĜO KAJ VIDINDAJ LOKOJ	
La plej juna granda majstro de ŝako en la mondo	4.48	En Zhangjiajie	1.16
Alloga ĉina akrobatiko	8.48	Raporto pri la vojaĝo en Ĉinio	3.14
Pekino: invito de la 29-aj Olimpikoj kaj mediprotektado	12.40	Bela kaj riĉa Taiwan	4.28
POR VIA SANO		Bela Hainan-insulo	8.40
Bateti la tutan korpon	1.50	Raportoj pri la okcidenta Hubei-provinco (I)	8.42
Kiel maljunuloj tenu junecon de sia cerbo?	3.28	En pitoreska urbeto Xikou	8.46
Saniga gimnastiko de Shen Junru (I)	7.50	Ekologia insulo	9.4
Saniga gimnastiko de Shen Junru (II)	9.50	Raportoj pri la okcidenta Hubei-provinco (II)	10.32
Bano utilas al sano	11.49	Nacimalplimulta urbo Jishou	11.44
SOCIA VIVO		Hidroelektra urbo ĉe la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero	12.28
"Karnavalo" sur la Leŭsa Altebenaĵo	2.32	Bela okcidenta Hunan	12.15
Moroj pri la Printempa Festo de Ĉinio	2.38	Pitoreskejo ĉe Huludao	12.42
Novajara festo de ĉinaj nacimalplimulto	2.40	INTERNACIAJ AFEROJ KAJ AMIKAJ KONTAKTOJ	
Diskuto pri virinoj	3.4	Fragmentoj el mia vizito en Japanio (I)	4.42
Por ke ĉiuj estu foraj de malriĉeco	3.32	Fragmentoj el mia vizito en Japanio (II)	6.44
Marŝo sur rulseĝo	4.8	Stupao de kvar japanaj bonzoj	9.20
"Portista armeo" de Chongqing	4.40	Nia prelega vojaĝo en Eŭropo	11.8
Plansetlejo en Pekino	9.38	ESPERANTO	
52 amleteroj	10.4	Por la idealo de Esperanto	1.8
Sindediĉo al aferoj por maljunuloj	10.36	"Miela monato" en Esperantujo (I)	1.10
Drivo sur Maoyan-rivero	11.46	"Miela monato" en Esperantujo (II)	2.13
Aliflanke de familio	12.5	Brilinta verda stelo	3.40
Du pigoj en mia hejmo	12.36	De Beijing al Tel-Avivo	6.48
JUNULARO		Mia Esperanta ĝardeno	8.28
Samideanoj de TEJO kaj Hongkong en Pekino	1.5	Kongreso por lingvo kaj kulturo de paco	9.33
La mondo en la manoj de junuloj	3.42	Raportoj pri la 56-a IJK	10.14
Amatoro de ekspediciado	7.46	Vere modela fil' homara! (Poemo)	10.43
Inter IJK kaj UK	11.32	Jarcenta maljunulo — Karl Maier	11.4
NACIOJ KAJ RELIGIOJ		Pri la dato de la naskiĝo de Esperanto	11.7
Danzeng kaj lia gastejo	3.20	Li verkas poemon de homa vivo	12.12

	Nr.pĝ.		Nr.pĝ.
50 JAROJ — EPĈ		Aŭtuna mateno	10.50
Mia vojo al Esperantujo	3.8	Malavantaĝo aŭ avantaĝo?	11.48
Esperanto-Paco-Ĉinio	3.9	Kiu estas pli favordonema?	12.43
Propra opinio pri la internacia lingvo Esperanto	4.14	ĈINAJ E-ISTOJ	
Kiel la ĉina E-movado povos progresiĝi?	4.15	Nuba, Ĝojlo kaj Rava	2.42
Esperanto — ponto kaj ligilo inter la popoloj	6.10	Mia revo ĉe la sojlo de la 21-a jarcento	4.10
La kvina suno	6.11	Esperanto — spegulo de vivo	6.8
EPĈ kaj mi en duonjarcento	7.10	Io Chou, eminenta entomologo kaj	
Ĉu mi povas forgesi?	7.12	batalanto sub verd-stela standardo	8.8
Voĉo de maljunulo	7.13	Mi estas obstina esperantisto	10.6
Esperanto — paco — Ĉinio	8.10	Esperanto kaj mi	12.8
Kiel mi kreskis kun "El Popola Ĉinio"	8.11	SUR NIA LIBROBRETO	
EPĈ kaj mi	8.12	Amo kaj saĝo donas forton	8.50
"Mi vin salutas, via ĉina amiko Eltunko"	9.8	Majstra traduko de majstra romano	9.46
Ĉinio estas ne fora	9.9	Esperantiĝis la dramo "Fulmotondro"	10.8
Konfeso de Esperanto-veteranino	10.10	ESP-NOVAĴOJ	1-12
Elito kaj elituloj	10.12	ALIAJ ASPEKTOJ	
Ha lo, geamikoj!	10.12	Perspektive al la nova jaro	1.4
Esperanto, Ĉinio kaj mi... triangula amrilato	11.10	Renkonte al la nova jarcento	12.4
EPĈ-leganto de 42 jaroj en Vjetnamio	11.10	Kune ĝui la paseon	12.39
Ĉinio — lando malproksima kaj proksima	12.10	EN ĈINAJ URBETOJ	
Karaj rememoroj	12.11	Hejmloko de naŝi-oj	1.25
ORIGINALE VERKITAĴ		Urbeto sur lago	3.24
Poemoj el Ukrainio	1.24	Interesa festivalo de "Ruĝa Vesto"	7.25
La knaba venĝo	2.16	Vizito al dong-oj	9.24
Interkomprenemo (Poemo)	3.10	Neĝlando	11.24
Freneza rakonto	4.12	TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ	
Somera lotusfloro (Poemoj)	6.12	Aŭtonomaj regionoj de Ĉinio; Admistrataj	
Du poemoj	7.36	distriktoj de Ĉinio	1.14
Tri poemoj	11.47	Iom pri ĉinaj pladoj	2.44
Poemoj	12.14	Ŝatataj dombestoj en Ĉinio	3.11
POR KOMENCANTOJ		Historio de Taiwan	4.7
Averto de montogrimpisto	1.13	Ĉinaj juro, juĝistoj kaj advokatoj	7.18
Bovlo da supo; Forgeŝemo	2.12	Kial geedza paro havas nur unu infanon?	9.44
La masto de la novjaro (Fabelo)	3.12	EL ĈINAJ GAZETOJ	1-4
Du fabloj	4.49		6-12
Viva fosilio — ornitorinko	6.14	INTER NI	1-12
Postvivantino	7.24	SUR LA KOVRILLO	
Indiferentaj herboj	8.13	Zhou Tao en la vespero "Muzikista Fojnbudo"	1
Reto de vivo	9.28	En festotago	2

	Nr.pĝ.		Nr.pĝ.
De vendistino al vicdirektorino	3	Alpistoj sur la plej altaj montpintoj de la	
Gaŭŝan-aj knabinoj	4	sep kontinentoj	4.21
Omaĝe al la Ora Jubileo de EPC	5	Amo al Engebei	6.20
Infanoj ĉe ruĝaj lanternoj	6	Familioj en groto	8.29
Renkontiĝo en Pekino	7	Neĝmonto Yulong	10.25
Blang-aj knabinoj	8	Revenis hejmen elafuroj	11.17
En universitato por maljunuloj	9	"Ĉarmaj floroj" en marfundo	12.25
"Tianshan-aj knabinoj"	10	VESTOJ DE ĈINAJ NACIOJ	
En Neĝa Vilaĝo	11	Jupo kaj kaptuko de li-oj	2.25
Alvenas la nova jarcento	12	Ĝino-aj vestoj	4.24
BILDOSERIOJ		Vestoj de taĝikoj	6.24
Zhou Tao, TV-anoncistino vaste ŝatata	1.28	Vestoj de blang-oj	8.24
Senneĝa skiado en Pekino	1.34	Vestoj de ĝingpo-oj	10.29
"Muzikista Fojnbudo" en la Imperiestra Palaco		Vestoj de de'ang-oj	12.20
en Pekino	2.28	ĈINAJ POŝTMARKOJ	
Ilia vivo ŝanĝiĝis	3.21	Poŝtmarkoj pri 12 aĝo-simbolantaj bestoj	1.51
Ĉemara urbo Dalian	3.34	Unuiĝo de ĉinaj nacioj	3.51
Kolektantino de ludiloj	3.44	Memore al la signifoplenaj eventoj	7.51
Geknaboj sin ekzercantaj per akrobataĵoj	4.17	Printempa festo	9.51
Mondfama ĉina filmostelulino Gong Li	5.29	Bambuoj	11.51
Ĉi tie estas Wangfujing	5.32	ĈINAJ METIARTAĴOJ	
"Mi pentras Eŭropon"	6.16	Emajla elefanto	2.51
Porcelanaĵoj de Fengxi	6.34	Jada bovlo	4.51
Brodaĵoj de Shaanxi	7.34	Bunta vitra botelo	6.51
Gastado en kamparana familio	8.34	Aprecado de umefloroj	10.51
"Kuracistoj de ŝtataj trezoroj"	9.29	Glazurita vazo kun blujaj desegnoj	12.51
Geedziĝo	10.20	SUR LA DORSKOVRILO	
Ludo de kuraĝuloj	11.14	Lago kaj monto en Zhangjiajie	1
Produktejo de verdaj agrikulturaĵoj	11.29	Rododendro	2
Vidindejo Shahu	11.34	Lijiang-rivero en nebulo	3
Mirinda valo en Kuqa	12.32	Banjano ĉe Lijiang-rivero	4
En kaj ekster klasĉambro	12.44	La okcidenta parto de Kunming-lago	
ORDINARAJ ĈINOJ		en la Somera Palaco	6
Mi fotas miajn gepatrojn	1.40	Vojaĝo tra dezerto	7
Lastaj fekportistoj	3.37	La Granda Muro en Pekino	8
Amo de maljuna usonano al Ĉinio	7.40	Akvofalo pendanta de sur alta monto	9
Avino vizitas lernejon	9.40	La Okcidenta Lago en Hangzhou	10
Maniuloj de teleregaj modeloj	11.41	Turo de la Imperiestra Palaco en Pekino	11
HOMARO KAJ NATURO		Glaciaj pendaĵoj sur arbo ĉe Songhua-	
La Birda Insulo sur altebenaĵo	2.17	rivero	12



Naĝo inter "buntaj floroj"

Hidroelektra urbo ĉe la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero

En Yichang troviĝas Gezhouba, la plej granda hidroelektrejo en Ĉinio, kaj Tri Gorĝoj, estonte la plej granda hidroelektrejo en la mondo. Kaj ilia jara produktokvanto de elektro superos 100 miliardojn da kWh, kiuj estos liverataj al duono de Ĉinio.

de XIAO KUI

LA Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero, unu el la naturaj heredaĵoj de la mondo, estas fama pro mallarĝeco de la rivero, alteco de la montoj kaj rapideco de la akvo fluo, sed oriente de Xiling-gorĝo la rivero fariĝas subite vasta kaj ĝia fluo malrapida. La turisma urbo Yichang ja situas tie. En la antikveco ĝi nomiĝis Yiling, kiu signifas en la ĉina lingvo malrapidiĝon de la akvo fluo kaj malaltiĝon de la montoj.

Yichang aperis antaŭ 2 400 jaroj. Multaj konas ĝin pro la Tri Gorĝoj. Antaŭe ĝi estis urbo tre malgranda, kaj nun mezgranda. Ĝi fariĝis fama pro tio, ke antaŭ pli ol 20 jaroj aperis tie sur Yangzi-rivero la akvobaraĵo Gezhouba kaj nun komenciĝis la granda akvoutiliga inĝenierio de la Tri Gorĝoj.

Yichang troviĝas en la okcidenta parto de Hubei-provinco, ĝuste en la loko liganta la mezan kaj supran partojn de Yangzi-rivero, ĉe la limo inter la provincoj Hubei kaj Hunan kaj la municipo Chongqing. Ĝi estis grava strategia loko en la antikveco. Kun 21 000 kvadrataj kilometroj ĝi ampleksas 6 guberniojn, 3 urbetojn kaj 4 distriktojn. Yangzi trafluas ĝin 237 km. En la urbo estas 99 malgrandaj riveroj ĉiu pli ol 10 km longa kaj la utiligebla hidroelektra povo superas 30 milionojn da kW, t.e. 15% de tiu de la tuta lando kaj 80% de tiu de la baseno de Yangzi-

rivero. En Yichang troviĝas Gezhouba, la plej granda hidroelektrejo en Ĉinio, kaj Tri Gorĝoj, estonte la plej granda hidroelektrejo en la mondo. Kaj plie, tie estas entute 400 mezgrandaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj. La generatora kapacito de ĉiuj tiuj hidroelektrejoj estos 23 milionoj da kW kaj ilia jara produktokvanto de elektro superos 100 miliardojn da kWh, kiuj estos liverataj al duono de Ĉinio. Tiel riĉaj hidroelektraj fontoj en la loko kun diametro de malpli ol 100 km estas malofte vidataj en la mondo. Yichang tute meritas la nomon "hidroelektra urbo".


La bonega geografia situo dotis la urbon per riĉaj vidindaĵoj. Kiel unu el la 11 famaj turismaj urboj de Ĉinio, Yichang havas belajn pejzaĝojn en la Tri Gorĝoj kaj grandan akvobaraĵon. La inĝenierio de la Tri Gorĝoj, pro kiu oni elspezos 200 miliardojn da juanoj (ĉ. 8.3 juanoj egalas al unu usona dolaro) en 17 jaroj kaj setlos milionon da lokanoj, ludos gravan rolon en la turisma afero de la urbo. Krom tio, kiel lulilo de Chu-kulturo, la urbo havas riĉan historion. Tie estis la hejmloko de Qu Yuan, granda poeto en la antikva Ĉinio, kaj Wang Zhaojun, unu el la kvar plej belaj virinoj en la antikva Ĉinio. Tie ankaŭ cirkulas multe da epizodoj de Tri Regnoj (220-280). Nun ambaŭflanke de Qingjiang-rivero vivas indiĝenaj tuĝja-oj kun interesaj naciaj moroj.

En Yichang estas 340 vidindaj lokoj, el kiuj 42 estas ĉefaj, inter kiuj 3 estas ŝtatnivelaj. Tie estas naturaj pejzaĝoj, naciaj moroj, historia kulturo kaj moderna civilizacio. Yichang estas unu el la 10 gravaj vidindejoj de Ĉinio. Nun en la urbo funkcias 23 stelaj hoteloj. En 1999 la urbo akceptis pli ol 5 milionojn da turistoj ĉinaj kaj alilandaj, kaj sole en la feria semajno ekde la 1-a de majo ĉi-jare 306 mil turistoj vizitis la lokon. Videblas, ke en la proksima estonteco turismo estos unu el la ĉefaj okupoj de la urbo.

Oni disvolvas novajn turismajn lokojn kaj samtempe konstruas ĝin en urbon kun belaj pejzaĝoj. Tie jam aperis ĉerivera parko 3.8 km longa, kiun oni nomas "unua ĝardeno" ĉe Yangzi-rivero. En la urbocentro estas Yiling-placo kun areo de 55 000 kvadrataj metroj. Oni konstruis ĝin post malkonstruo de komercaj domoj. En 2000 oni komencis planti multe da arboj en iuj gravaj lokoj, por ke la loĝantoj havu bonan ekologian medion.

Oktobro estas la plej bona monato por turistoj. Por prezenti sian belecon kaj diskonigi sin, Yichang okazigis internacian turisman festivalon.

En 2009 komplete plenumiĝos la inĝenierio de la Tri Gorĝoj kaj la akvorezervejo profundos 175 m. Tiam aperos imponaj pejzaĝoj en la granda lago 650 km longa sur altaj montgorĝoj inter Yichang kaj Chongqing, kaj Yichang fariĝos grava internacia hidroelektra turisma urbo. ■





S-ro Zhou Zhilin

Pri pentristo Zhou Zhilin

de PANG NAIYING

S-RO Zhou Zhilin, unuaklasa ĉinstila pentristo, estas lerta en pentrado de floroj kaj birdoj. La stilo de liaj pentraĵoj ne estas fajne skiza, sed simpla en aranĝo de linioj. Strekado de kelkaj linioj jam konturas florojn kaj birdojn kaj plene esprimas lian humoron. Tia stilo en ĉinstila pentrado estas nomata “granda skizo”, kaj la verkoj de Zhou Zhilin nomataj “grandaj floroj kaj birdoj”.

Rigardante verkojn de Zhou, oni povas percepti belecon de ritmo. En lia pentraĵo “Printempo” oni vidas balanciĝantajn salikajn vergojn kaj sentas fortan movecon. Inter la branĉoj kvivite flugantaj hirundoj similas al serio da saltantaj muziknotoj, kiuj sonigas gajan printempan melodion. Kaj en la pentraĵo oni sentas ankaŭ serenon humoron.

Esprimi la vivo-konscion de homoj pere de pentrado de floroj kaj birdoj estas arta karakterizaĵo de Zhou Zhilin. Umefloroj en prujno en lia pentraĵo ne havas brilan koloron, sed elspiras neflekseblecon. La naĝantaj fiŝoj kaj mergiĝintaj anasoj, simple konturitaj, ne estas tre similaj al la veraj, ĉar li akcentas la disvolviĝon de la vivo. Do ĉio alia en la fono ŝajnas superflua, kaj en la pentraĵo restas granda blanka spaco. Li saĝe donis koloron al la papero kaj vidigis travideblajn sulkojn sur la akvo, por plifortigi ties fluecon kaj klarecon. En siaj pentraĵoj li esprimas la

homan aspiron al la pura kaj kvieta vivo pere de la belaj formoj de la vivaĵoj kaj ankaŭ la homan deziron pri la trankvilaj kaj liberaj cirkonstancoj de la ekzisto.

En sia knabeco Zhou Zhilin ofte amuziĝis ĉe la lotusa lageto en sia hejmvilaĝo kaj prenis fiŝojn kaj stilzobirdojn kiel amikojn. Tial dum multaj jaroj tiuj stilzobirdoj inspiris lin por pentrado. Kiel animitaj, la birdoj aŭ ĝuas susuradon de pluvogutoj sur lotusfolioj aŭ spektas aŭtunan pejzaĝon starante sur arbobranĉo aŭ amin-dumas ĉe la bordo aŭ distriĝas en fragmitejo... La plej interesaj estas grasaj anseroj, facile alireblaj kaj iom komike aspektantaj, sed fakte nur kaŝantaj la saĝecon per ŝajnigita stulteco. Jen la animitaj “grandaj floroj kaj birdoj”, venintaj el la percepto de la pentristo, kion li nomas “mia naturo”. Ĝi malkovris la sekreton de la “granda skizo”: La objektoj en la pentraĵoj jam ne estas la originaloj en la naturo nek la nudaj ideoj kaj abstrakta sento, sed objektoj animitaj per la percepto de la pentristo.

Zhou Zhilin pentras ankaŭ pejzaĝojn kaj homojn, sed akcentas animadon pli ol aspekton. Bambua barilo kaj pajltegmeta dometo en liaj pentraĵoj estas klinaj, la strekita linio de luno ne estas ronda, sed zigzaga, supozeble kaŭzita de kovrado de nubo aŭ nebulo. Homoj en liaj pentraĵoj estas misproporciaj, ne zorgantaj pri la aspekto. Ili aŭ ne portas ŝuojn aŭ havas malordajn harojn aŭ estas nudaj je la brusto kaj

umbiliko; ili havas aŭ elstarantan barbon aŭ densajn vangharojn aŭ barbon senorde falantan antaŭ la brusto. En liaj pentraĵoj ili aŭ fiŝhokas en ombro de saliko aŭ amuziĝas en pluvo kun lotusfolio kiel ombrelo aŭ versas rajdante sur azeno aŭ kriadas, rigardante al la ĉielo kun ruĝaj falfolioj kirlitaj de okcidenta vento... Tiuj geniaj, sed mizeraj kleruloj en la antikveco males-timis altrangajn potenctenantojn kaj agis laŭ sia propra juĝo, kaj ili estas respektataj de la pentristo. Per senkatena liniado kaj admirinda kaj surpriza plastiko li penetre bildigis la senĝenajn klerulojn. Pro la vera sento li troige transformis ilin, preferante simplecon al delikateco kaj malbelecon al kaĵolo. Jen tiuj aspekte ordinaraj homoj kun nobla virto montras supernaturan belecon.

Menciinde estas, ke ĉe la komenco la “granda skizo” ne celas puran estetikon, sed esperas, ke la homoj konscios en arto la homan filozofion pli belan ol formala beleco. Tial la “granda skizo” estas arto alvokanta al la naturo, kaj ĝi estas ankaŭ lingvo; ĉio en la universo povas esti laŭplaĉe utiligata de pentristoj por eŭfemisme kaj amplekse esprimi ilian internan mondon. Tial okcidentaj artistoj opinias, ke la “granda skizo” de Ĉinio estas arto de vivo, arto plej valora kaj plej longdaŭra pro tio, ke ĝi povas plej komplete esprimi ĉiajn dezirojn, ĝojon kaj ĉagrenon de la homoj.

Por posedi la arton de la “granda skizo”, oni devas havi firman




bazon de la memkulturo de la klereco kaj virto. Fama ĉinstila pentristo Qi Baishi (1860-1957) diris: "La plej granda bedaŭro en mia vivo estas, ke mi ne posedas la arton enkorpiĝi *caoshu* en miaj pentraĵoj." *Caoshu* estas unu el la formoj de la ĉina kaligrafio, kaj ĝia karakterizaĵo estas rapideco en skribado kaj kontinueco de la strekoj de la ideogramoj. Kaj la pentraĵoj de Zhou Zhilin

havas la guston de *caoshu*. Li naskiĝis en familio de alte klerigitaj altranguloj. Post deoficiĝo lia avo, kiu ne estis kapabla en terkulturado, ĉiam kaligrafis kaj fariĝis fama kaligrafo en la loko. Zhou Zhilin deinfance kutimiĝis al kaligrafado kaj multe progresis en tio. Kaj li tre ŝatis preni branĉeton kiel penikon por pentri sur sablejo lotusflorojn, birdojn k.a., kaj tio daŭris de la aĝo de 4

jaroj ĝis la puberiĝo. En 1959, kiam lia patrino pretis transloĝiĝi en Pekinon, li iris en la familian templeton por adiaŭi la prapatrojn. Li prenis tie penikon postlasitan de la avo kaj forveturis kune kun la patrino. De tiam la peniko akompanis lin en multaj malfacilaj jaroj ĝis la maturiĝo de lia pentrarto, kaj li akcentis la arton mem, sed neniam penis plaĉi al la triviala gusto de la socio. ■



Mirinda valo en



Kuqa



Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG





En la gubernio Kuqa de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kuŝas mirinda valo.



La valo estas 10 km. longa kun abruptaj krutaĵoj ambaŭflanke. Pro pluva lavado en jarmiloj, tie formiĝis mirindaj teraj kolonoj de diversaj formoj, luj similas al kirasitaj militistoj, rigardate de malproksime, aliaj al akraj spadoj suprenlevitaj al la ĉielo, rigardate de proksime, kaj triaj al frandemaj ursidoj, dormantaj leonoj, altaj kameloj, vosto-etendantaj pavoĵoj aŭ petolaj simioj. La aspekto de la kolonoj varias laŭ ŝanĝiĝo de la starpunktoj de la rigardantoj. Irante en la zigzaga valo, oni trovas, ke la krutaĵoj kvazaŭ subite falas de la ĉielo kaj formas mallarĝan strion, tra kiu povas iri nur unu homo. Subite prezentiĝas antaŭ la okuloj vasta spaco. La pejzaĝoj ŝanĝiĝas ofte.

La tuta valo en ruĝa koloro ĥameleonas laŭ ŝanĝiĝo de la sezonoj kaj veteroj. Ĉe sunsubiro, kiam estas vespera ĉielruĝo, la tuta valo aspektas aparte bela: La priradiata rokmuro ore brilas, dum ĝia dorso estas tute nebulita, malfacile rekonebla.

La mirindaĵo estis trovita de ujgura paŝtisto, kiu foje venis en la valon kaj eliris el ĝi nur post 3 tagoj. Li rakontis al la samvilaĝanoj sian spertaĵon. Informiĝinte pri tio, la loka registaro sendis esplori la valon kaj laŭ ĝia aspekto nomis ĝin Mirinda Valo.

Fakuloj diris, ke formiĝo de la valo havas striktan rilaton kun la tieaj geologia strukturo, geologia movado, klimato, grundo, flaŭro, akvo kaj aliaj naturaj kondiĉoj. Dum longaj jaroj pro akva lavado kaj venta erozio la tero formis allogajn pejzaĝojn.





Du pigoj en mia hejmo

De mateno mi jam ekĝuas gajan vivon dank' al la pigoj, kaj la ĝuado fariĝas pli kaj pli frua, ĉar ili konkure enflugas en mian ĉambron por saluti min. Poste ili kuŝas apud mia kuseno, kaŝas la kapon sub la flugilon kaj refoje ekdormas.

de PANG NAIYING

ENPAŜINTE en la hejmon post laboro, mi tuj dronis en etoso de varma pepado de birdo: tio estas gaja hurao de la du pigoj en mia hejmo. Post tio ili salutas min: "Ni hao (saluton)!" Kiam mi eniris en la ĉambron, ili ĉirkaŭflugis min daŭre dancante kaj kantante, jen kaj jen plukis de sur la planko paperpeceton aŭ stangeton kaj enigis ilin en mian manon... Je tio forvaporigis la premo de la bruanta mondo.

SENLACA MANĜADO

Antikvaj ĉinoj diris, ke "la plej grava afero de la homoj estas manĝo". Tiu vero taŭgas ankaŭ por birdoj. Ĉion ili manĝas kaj la apetito estas terure bona. Ili povas unufoje engluti pli ol 20 vermojn kaj ĉiuj truoj grandaj kaj malgrandaj sur la muroj estas iliaj tenejoj. Tio estis majstraĵo de la granda pigo. Sin apogante sur sia forteco, ĝi ofte manĝas pli multe ol la alia, sed kiam ĝi penas por kaŝi la restantajn manĝaĵojn, la malgranda silente rigardas apude. Apenaŭ la granda forflugas, la malgranda venas kaj ŝtele frandas, kaj se ĝi ne povas formanĝi ĉion, ĝi ŝovas la restaĵojn en miajn poŝojn, kolumon aŭ faldon de mia ĉapo. Se mi ne ĝustatempe rimarkas la enŝovitajn vermojn, la vermoj kunveturas kun mi al laborloko dum pluraj tagoj.

Pano-vermo estas ĉefa nutraĵo de la pigoj. Mi bredas la vermojn en la kuirejo, kaj la kuirejo do fariĝis loko ofte sturmata de la

pigoj. Mi rigore gardas la lokon kontraŭ ilia atako, sed ili ĉiam trovas ŝanon por entrudiĝi en la kuirejon. Se ili ne trovas la pelvon de vermoj, ili saltas sur la tablon, en pladojn aŭ eĉ en rizpoton. Ili estas spritaj en rabo. Pro ilia entrudiĝo kelkaj bovloj falis teren kaj frakasiĝis. Se nenion ili trovas por manĝi, la granda pigo staras sur gastubo kaj persistas en silenta protesto, malgraŭ ke mi senĉese svingas kuleron. Ili kontente forflugas nur kiam mi prezentas al ili arakidojn aŭ biskviton. La malgranda pigo imitas la grandan, sed ne tiel brava kiel la unua, kaj kiam mi minacas ĝin per bastono, ĝi tur fortunias sin. Sed kompreneble mi donas saman nutraĵon al la malfortulo.

Kiam ni iras al laboro, ni devas fermi la pordon de la kuirejo. Mi pretigas por ili glason da lakto, unu pomon kaj pecon da torto. Se ili formanĝas ĉiujn tiujn sed ankoraŭ ne sentas sufiĉon, ili ofte venas al kaprica petolaĵo: Ili bekpikas akvomelonon, pikrompas duonkorbon da ovoj, kaj se ili ŝatas ovon, ili rulpuŝas la restantajn ovoj sub la ŝrankon... Unuvorte, miaj pigoj absolute ne estas stulte frandemaj, ilia frandado montras ilian guston kaj saĝecon.

Senĉesa manĝado certe kaŭzas senĉesan purigadon de la kopro kaj intestoj. Se ili sate manĝas belajn kaj bongustajn berojn, ili certe postlasas sur miaj kotonaj litkovriloj kaj aliaj kovrotukoj freŝkolorajn kaj neforlaveblajn makulojn. Ĉio tio estas natura konsekvenco de ilia bezono —

kiam ili flugas, ili ne bezonas pezan korpon sed senĉesan aldonadon de nutraĵoj. Se ni komprenas tion, ĉu ni ankoraŭ ne povas pardoni ilin?

KOMPLETA LIBERECO

Amikoj miris: "Kial vi ne fermas ilin en kaĝo aŭ liberigi ilin?" Sed miaj pigoj ne konsentas.

La granda pigo venis en mian hejmon en la komenco de 1997. Mia filino kondukis ĝin en mian hejmon. Ĝi havas nigran verton, blankan bruston, grizan dorson kaj malhelbluajn flugilojn. Sed ĝiaj longaj vostoplumoj rompiĝis en la kaĝo. Mia filino diris: "Ni nomu ĝin Bold. Ĝi ne estas kvietema. Nelonge post elkoviĝo ĝi falis de sur arbo kaj mia kamarado trovis ĝin sur riverbordo. Li nutris ĝin preskaŭ 3 jarojn en sia balkono, kaj ĝi povas diri 'saluton'." Rimarkinte ĝian malpaciencon, mi malfermis la kaĝon. Ĝi multe vigliĝis kaj subite kriis: "Saluton!" Kaj ni fariĝis amikoj. Pro nekompleteco de vostoplumoj, ĝi ne povas flugi alte, kaj ĝi sin ekzercis ĉiutage energie. Foje ĝi peze falis teren kaj malĝoje klinis la kapon dum longa tempo. Ankaŭ mi sentis doloron en la koro, ĉar mi scias, ke ĝi volas havigi al si fortajn flugilojn.

Post nelonge, por liberigi Bold el soleco, ni aĉetis malgrandan nigrablankan pignon Makuleto kiel ĝian kunulon. Sed ekster nia atendo, la novveninto kreskis rapide kaj estis furioza. Krom forflugigi ĝin ni povis fari nenion. Poste, kiam revenis

Makuleto al mia fenestro, Bold flugis al la fenestro, staris sur mia kapo, svingis la flugilojn de ekscitiĝo kaj imitis mian vokon "venu, venu". Mi sciis, ke Bold sopiras Makuleton, kaj kelkfoje prove malfermis la fenestron, sed Bold forturnis sin — ĝi ne volas forlasi nin. Certe Bold rakontis al Glug pri Makuleto — se ne, kial ankaŭ la griza pigeto Glug timas, ke mi malfermos la fenestron?

Glug venis al mi en la fino de la printempo de 1998. Tiam ĝi havis grizan plumaron. Inter printempo kaj somero, kiam ĝi ŝanĝas siajn plumojn, ĝi ofte tiras mian fingron per la beko kaj klinas la kapon por sugestii al mi, ke mi gratu ĝin.

Estis bedaŭrinde, ke Glug ne fariĝis intimulo de Bold, sed fariĝis mia ombro, kaj monopoligis mian ŝultron, la kutiman lokon de Bold. Por ne ĉagreni Bold, mi ĉiam klopodis por trovi ŝancon por montri mian korinklinon al Bold. Sed Glug ĉiam la unua flugis sur mian manon kaj faris sonon similan al kiso, ŝajne sugestante al mi, ke mi kisu ĝin. Kaj Bold forflugis kaj iom post iom malproksimiĝis de mi.

Bold ne estas elstara kantisto, sed ĝia fajfado estas orelplaĉa. Glug imitis ĝin kaj fine sukcesis bele fajfi. Kiam mi vokas ĝin, ĝi ĉiam respondas al mi per koketa, pigra kaj naiva tono: "Je — s!"

De mateno mi jam ekĝuas gajan vivon dank' al la pigoj, kaj la ĝuado fariĝas pli kaj pli frua, ĉar ili konkure enflugas en mian ĉambron por saluti min. Poste ili kuŝas apud mia kuseno, kaŝas la kapon sub la flugilon kaj refoje ekdormas. Kiam mi vekiĝas kaj iras en tualetejon, Glug sekvas min. Kiam mi brosas la dentojn, ĝi certe la unua trinkas akvon. Kiam mi lavas mian vizaĝon, ĝi certe ŝovas la kapon en akvon...

En tago Glug staras sur mia

maldekstra mano por rigardi mian skribadon. Ĝi estas kvietema kaj ne petola kiel Bold. Antaŭe, se Bold perdis paciencon pro longa atendo, ĝi ofte ŝiris mian paperon aŭ kaŝis mian skribilon. Tio estis distraĵo de sagaco: ĉe mia malatento ĝi ofte forprenas mian fontoplumon aŭ ĝian ingon, haltas sur alta loko kaj malice pririgardas mian koleron. Foje mi rimarkis, ke ĝi refoje faris plonĝon, kaj tuj kovris per mano la plumon, sed ĝi forbekis pilolon kaj metis ĝin sur la plankon. Mi leviĝis por preni la pilolon, kaj ĝi tuj revenis al la tablo kaj forportis la fontoplumon... Evidente ĝi ne estas tiom saĝa kaj mi ne bezonas gardi min kontraŭ ĝi. Nokte ĝi dormas frue, kaj Bold alflugas al mi por min akompani ĝis mia enlitiĝo. Se ĝi soifas, ĝi senĝene trinkas el mia taso.

ARDA DEZIRO PATRIĜI

Mi ĉiam prenas la du pigojn kiel miajn du infanetojn, sed Bold ne kontentas kaj volas esti nur dommastro negastama. Ĝi prenas sur sin la devon gardi la domon kaj rigardas gastojn ŝtelistoj aŭ rabistoj. Ĝi pikas nekonatajn gastojn aŭ transflugas tuj super la kapo de la gastoj, kun timiga grako, dum Glug sin kaŝas sub la lito kaj atendas ŝancon amikiĝi al la gastoj. En milda voko de la gastoj, ĝi flugas antaŭ ilin, salutas en streĉiteco, senĉese kantas aŭ prezentas ŝatatan vermon rekte en la buŝon de la gasto... Se la gasto diris: "Glug, ĝis revido!", ĝi tuj baras al li la vojon kaj faras sonon kiel tiu de dorlotata infano, esprimante bedaŭron.

Sub la rigora kontrolo de Bold, ni ne povas libere uzi televidilon, komputeron kaj telegvidilon de klimatizilo, kaj eĉ vekhorloĝo en sonorado estas celo de ĝia atako.

Tiu granda birdo ne permesas al ni saluti en telefonado. Ĉiufoje,

kiam eksonas la telefono, ĝi tuj saltadas sur la ciferbutonojn ĝis interrompiĝo de la kontakto, aŭ ĝi daŭre grakas al la aŭdilo, ke la vokanto tute ne povas aŭdi. Mi do instalas du telefonojn. Sed ĉiufoje ĝi la unua atingas la aparaton. Poste pli kaj pli serioziĝis la afero: je la unua sono de telefono ĝi jam komencas pikbeki homojn. Poste telefono silentiĝis — ĝi rompis la lineon. Tio ja estas genia detruo: Unue ĝi rompis per beko unu el la du kuntorditaj dratoj, poste ĝi kaptis la alian kaj senĉese sin turnadis ĉirkaŭ ĝi, ĝis ĝi rompiĝis...

Glug ne estas tiel despota, sed ĝi ne toleras mian ĉapon — se mi metas sur min la ĉapon, ĝi certe atakas ĝin. Supozeble tiam ĝi pensas: Kiu rajtigas vin atenci mian lokon?! Do kiam mi demetas la ĉapon, ĝi longe sidas sur mia kapo kaj foje endormiĝis. Pli poste mia ĉapo fariĝis ilia necesejo.

En la lastaj du printempoj Bold interesiĝis pri bambua korbo sur la supro de mia ŝranko. Ĝi striigis multe da molaj paperrulaĵoj kaj metis ilin en la korbon. Foje ĝi malligis bulon de plasta ŝnuro, kaptis la ekstremon kaj senĉese ŝovis la ŝnuron en la korbon. Post laboro ĝi amindumis Glug... Mi supozis, ke ĝi volas patriĝi.

En serena printempa tago mi aĉetis multajn florojn kaj arbidojn, por ke la ĉambro havu viglan etoson plenan de flora aromo. Mia fratino diris, ke mia hejmo estas paradizo de birdoj. Sed mi opinias, ke paradizo de birdoj devas esti en pitoreska loko kun verdaj montoj kaj klara fluanta akvo. Do eble en la estonteco mi transloĝiĝos en la kamparon. Mi ne bezonas grandan domon, sed volas nepre havi altan arbon en la korto, por ke miaj pigoj povu fari neston sur ĝi. Tiam ili povos libere serĉadi nutraĵojn, amindumi, kantokonkursi kaj flugi sur la ĉielo. Kaj kion mi faru? Mi prizorgu iliajn infanojn. ■

SOVAĜAJ KAMELOJ

En Xinjiang troviĝas la sovaĝkamelata naturparko Altun-Lopnur kun 150 000 kvadrataj kilometroj.

La sovaĝaj kameloj tre similas al dresitaj. Nur sperta kamelisto povas distingi ilin de la domkameloj laŭ iliaj malaltaj ĝiboj, maldikaj kruroj kaj palflavaj haroj.

La sovaĝaj kameloj vivas en senlima kaj seka dezerto. Ili facile alkutimiĝas al la dezertaj kondiĉoj. Ili povas elteni malsaton kaj soifon kaj piediri ĉ. 1 000 km en iom pli ol 20 tagoj en dezerto. Ili estas grandaj, kaj sur iliaj piedoj estas dika kaj larĝa karno simila al risorta matraco. Iliaj piedfingroj estas disaj, kio ebligas al ili stabilan iradon sur mola tero sen sinki en sablejon. Iliaj okulharoj estas longaj, ĉirkaŭ iliaj oreloj kreskas mallongaj haroj kaj iliaj naztruoj povas libere fermiĝi kaj malfermiĝi. Ĉio ĉi defendas ilin kontraŭ vento kaj sablo. Iliaj vidado kaj flarado estas tiel akraj, ke ili povas senti akvon kaj oazon en malproksimo.

La sovaĝaj kameloj pariĝas en printempo. La kamelinoj gravediĝas por 12-13 monatoj. Ĉiufoje la graveda kamelino naskas unu idon, kiu povas vivi sendepende post unu jaro kaj komplete maturiĝas en la aĝo de 4 aŭ 5 jaroj.

Ili ŝatas vivi arope. Proksime de Altun-monto sciencistoj vidis fortan virkamelon malrapide irantan kun 17 kamelinoj kaj 16 kamelidoj,

kies vivkutimoj estas interesaj. La sovaĝaj kamelidoj estas batalemaj. Ili ofte batalas unuj kontraŭ aliaj. Tiaokaze la gardanta kamelino blekadas por disigi ilin. Se ili ne obeas, la kamelino kolere elvomas sur ilin manĝaĵon kaj viskozaĵon el sia stomako, por ke iliaj okuloj ne povu malfermiĝi, tiel ili devigite ĉesas batali. En varmaj tagoj virkameloj forlasas dezerton kaj iras al loko riĉa je akvo kaj herboj. Se lupro sin kaŝanta profunde de herbejo rimarkas la sovaĝajn kamelojn, ĝi sin ĵetas al ili, tiam ĉi tiuj tuj kuregas foren por eviti la persekuton. Jen komenciĝas "maratona konkurso" inter la sovaĝaj kameloj kaj lupro.

Sub tiaj malfacilaj kondiĉoj la sovaĝaj kameloj sin defendas kontraŭ la malamikoj.

(Liu Yusheng)

KARSTA GROTO KAIYUAN

Boshan-distrikto de Zibo, Shandong-provinco, areo 682 kvadrataj kilometroj. Ĝi estas


fama produktaĵo de ceramikaĵoj kaj glazuraĵoj en Ĉinio. Kun verdaj montoj, kvietaj valoj, prospera arbaro kaj belaj fontoj, grotoj kaj rokoj, ĝi estas ideala loko por ekologia turismo kaj feriado. La karsta groto Kaiyuan, malfermita antaŭ kelkaj jaroj, estas unu el la famaj pejzaĝoj en Boshan.

La groto ricevis sian nomon pro la stalaktitoj eltrovitaj en la regperiodo de Xuanzong, kies erao estis Kaiyuan de la dinastio Tang (618-907). Komence, kiam oni malkovris la groton, ĝia aperturo, granda kiel puto, rigardis supren kaj profundis abisme. La groto estis koridor-forma kun longo de 744.9 m. Ĝi konsistas el 6 labirint-similaj haloj, kiaj la Halo de Akva Kurteno, Halo de Perloj kaj Halo de Avalokitesvaro.

En la Halo de Akva Kurteno estas multaj belaj stalaktitoj kaj stalagmitoj en formoj de pagodo, arbaro, flago, kurteno, floroj k.a. La kuriozaj belaĵoj forte allogas la vizitantojn. Sur muro de la halo vidiĝas trueto, el kiu fluas senĉese akvogutoj, kiuj prezentas akvan kurtenon. La Halo de Perloj

estas impona. Sur ĝiaj volbo kaj rokmuoj pendas multaj perlosimilaj trembrilaj globetoj, kiuj estas tre ravaj. En la Halo de Avalokitesvaro, irante sur vojeto jen leviĝanta jen malleviĝanta, oni povas klare aŭdi lirlon de akvo. Ĉe la murpiedo estas "stuparkampaj kradoj" kaj sur la rokmuoj pendas grapoloj da "vinberoj". La loko impresas kiel ĝardeno plena de freŝa aero.

En la groto oni iam trovis pecojn de ceramikaĵoj, feraĵoj kaj armiloj faritaj en Tang-



Stalagmitoj en la groto

dinastio. Tio montras, ke la loko estis multe vizitata jam en Tang-dinastio.

(Ji Ping)

SERPENTA INSULO

La nomita insulo kun areo de malpli ol unu kvadrata kilometro troviĝas en maro, proksime de la urbo Dalian, nordorienta Ĉinio. Ĝi estas naturparko protektata de la ŝtato. Sur la insulo prosperas aceroj, ĉerizujoj kaj kverkoj kaj ili ĉiuj estas malaltaj kaj povas defendi sin kontraŭ marvento. Printempe sur la insulo ĉie kreskas floroj ruĝaj, palruĝaj, flavaj kaj bluaj, kiuj impresas kiel atlasa tapiŝo kovranta la teron.

Nun oni jam ne scias la antaŭan nomon de la insulo. Ĉar sur ĝi vivas multege da vipuroj, tial oni nomas ĝin serpenta insulo. En 1984 sciencistoj konstatis, ke tie vivas 12 000 vipuroj, kiuj ĉiujare povas naski 1 000 idojn.

La tieaj vipuroj manĝas birdojn. Manĝinte unu birdon, vipuro povas vivi 3-8 monatojn, tial se ĝi havas 3-4 birdojn por manĝi ĉiujare, ĝi estas kontenta kaj povas komforte vivi.

Sur la insulo estas speciala parto, kie turistoj povas rigardi vipurojn. Ĉi tiuj estas lertaj en kamuflado. Iuj el ili volvas sin sur arbotrunko. Ĉar ilia verda korpo estas identa kun la koloro kaj formo de la trunko, tial oni malfacile rimarkas ilin, eĉ starante proksime. Aliaj sin kaŝas en rokfendoj. Tie ne nur ilia korpa koloro, sed ankaŭ ilia moviĝo kaj la teniĝo de ilia ripozo identiĝas kun la medio. Ĝuste pro ilia lerta kamuflado, printempe kaj aŭtune la migrantaj birdoj ofte estas ĉasataj de ili tuj post sia halto post longa flugado. Iom post iom la loko fariĝis paradizo de serpentoj.

(Ding Song)

Kune ĝui la paseon

— Rezultato de la konkurso “50 jaroj — EPC”

Ekde la 11-a numero 1999 ni publikigis anoncon por peti artikolojn por la konkurso “50 jaroj — EPC”, kiu finiĝis ĉi-numere. Slovaka samideano Jozefo Kristian la unua sendis al ni la artikolon “Propra opinio pri la internacia lingvo Esperanto”, kiu aperis en la 4-a numero 2000. Ĝis julio ni ricevis verkojn de 42 legantoj el 24 landoj, inter kiuj estis 6 konkursantoj el Ĉeĥio, 5 el Vjetnamio kaj 5 el Ĉinio. Ni kortuŝiĝis, ke iuj legantoj eĉ plurfoje sendis al ni kontribuadojn. Ĉiu konkursaĵo prezentis al ni emocian rakonton. La konkursaĵoj montras, ke EPC havas rilaton nedisigeblan de la legantoj dum la pasintaj 50 jaroj. Por retrorigarditi tion, ni aperigis 22 artikolojn, sed iuj aliaj ne estis publikigitaj kiel konkursaĵoj pro enhavo aŭ formo, ekz. poemoj de Mikaelo Bronŝtejn el Rusio estis metitaj en la rubrikon “Originale verkitaj” en la 7-a numero 2000. Baldaŭ aliaj poemoj kaj prozaĵoj aperos rete.

El la 22 artikoloj ni elektis kelkajn elstarajn. La unuan premion gajnis “Esperanto — ponto kaj ligilo inter la popoloj” de Maurice Sujet (Francio); la duan premion gajnis “Ĉu mi povas forgesi” de Carmel Mallia (Malto), “Konfeso de Esperanto-veteranino” de Jarmila Ryznarova (Ĉeĥio) kaj “EPC kaj mi en duonjarcento” de Guozhu (Ĉinio); kaj la trian premion gajnis “Mia vojo al Esperantujo” de Linke Szasz (Rumanio), “La kvina suno” de Fidel Figueroa M. (Meksikio), “Esperanto — paco — Ĉinio” de Dinko Matkovic (Kroatio), “Mi vin salutas, via ĉina amiko Eltunko” de Adolf Burkhardt (Germanio), “Esperanto, Ĉinio kaj mi... triangula amrilato” de Raymond Wylleman (Belgio), “EPC-leganto de 42 jaroj en Vjetnamio” de Dang Dinh Dam (Vjetnamio) kaj “Ĉinio — lando malproksima kaj proksima” de Vlastimil Kocvara (Ĉeĥio).

Kompreneble ĉiuj konkursantoj ricevos donaceton.

Dankon al ĉiuj!

La Red.

Pekino: invito de la 29-aj Olimpikoj kaj mediprotektado



En la lasta fojo oni deziris, ke dank' al okazigo de la Olimpikoj pliboniĝos la loĝkondiĉoj kaj trafiko, sed ĉi-foje oni donas la atenton ĉefe al la urba medio k.a. Pro tio la pekina registaro lanĉis la agadon por verdaj Olimpikoj.

de ZHANG ZHEN

AŬGUSTON ĉi-jare la Plenuma Komisiono de la Internacia Olimpika Komitato aprobis Pekinon kaj aliajn 4 urbojn kiel kandidatojn por invito de la Olimpikoj en 2008. Tiuj 5 urboj havas ĉiu siajn proprajn trajtojn. Krom la antikva kulturo de Pekino, ankaŭ la fervoro de la 1.3 miliardoj da ĉinoj por la Olimpikoj certe altiros la atenton de la internacia publiko. Kvankam ĝia mediprotektado gajnis ne tiom multajn poentojn, tamen ĝi reformas sin laŭ bona plano, kiun laŭdas ankaŭ la Plenuma Komisiono.

La plano koncernas


stadionojn, sportajn halojn, sportajn aparatojn, plibonigon de la medio kaj aliajn. Pekino, urbo ne malserioze poluita, devas fari grandan penadon por atingi radikalan plibonigon de sia medio. Kiel do iras ĝia penado por inviti la Olimpikojn kaj kiujn rimarkigojn havas la pekinanoj en tiu laboro?

Jen ekzemplo: Antaŭ nelonge usona ĵurnalisto el Atlanto vizitis Pekinon kaj foje li veturis per taksio, kondukata de s-ro Meng. La ĵurnalisto demandis lin, kian opinion li havas pri penado de Pekino por inviti la Olimpikojn. S-ro Meng respondis: "Se ni sukcesos, la trafiko, enoficigo kaj turismo de nia urbo ege pliboniĝos. Ĉiuj pekinanoj deziras sukceson. Mi loĝas en la suda parto de la urbo. Eble la loĝkvartalo, kie troviĝas mia hejmo, estos malkonstruita kaj tiam ni havos novan loĝdomon." La ĵurnalisto de Atlanto, kie okazis antaŭ 4 jaroj la Olimpikoj, estis kortuŝita de la simpla, sed konfidencema respondo kaj publikigis artikolon en sia ĵurnalo multe laŭdantan la firman volon de ordinaraj ĉinoj por inviti la Olimpikojn.

La vortoj de s-ro Meng montras, kiel ordinaraj ĉinoj traktas Olimpikojn. Ili opinias, ke Olimpikoj portos al

ili ŝancon por plibonigi la vivmedion. Tian sintenon havas ankaŭ popolaj medi-protektaj organizoj kaj registaroj. En tio kuŝas ankaŭ la diferenco de iliaj ĉi-foja kaj lastfoja petoj pri invito de la Olimpikoj. En la lasta fojo oni deziris, ke dank' al okazigo de la Olimpikoj pliboniĝos la loĝkondiĉoj kaj trafiko, sed ĉi-foje oni donas la atenton ĉefe al la urba medio k.a. Tio ja estas progreso. Komprenoble tio havas ankaŭ rilaton kun atento de la Internacia Olimpika Komitato, kiu prenas medion kiel unu el la faktoroj utilaj al okazigo de Olimpikoj, same kiel sportoj kaj kulturo.

La 24-an de aŭgusto 2000 publikiĝis la plano "Verdaj Olimpikoj" por radikale plibonigi la medion de Pekino, kiu strikte rilatas kun invito de la Olimpikoj. Laŭ tiu plano ekde 2007 Pekino uzos ekskluzive purajn energiojn kaj en 2004 praktikos la normon pri vostgaso de la leĝeraj aŭtoj, egalan al la eŭropa normo n-ro 2, efektiviĝos sintezan traktadon pri klasifika repreno de rubo, neniigos industrian poluon, translokos 200 fabrikojn el la urbaj kvartaloj kaj verdigos 40% de la urbo. El la plano vidiĝas, ke Pekino bezonas urĝan mediprotektadon. La plano esprimas tiel la firman volon de la loĝantoj de Pekino pri plibonigo de la medio kiel la deziron inviti la Olimpikojn. Ĝuste pro tio la ĉi-foja peto pri invito de la Olimpikoj estas multe subtenata kaj komprenata de la publiko.



Emblemo el floroj kaj herboj por invito de la 29-aj Olimpikoj al Pekino

S-ro Liao Xiaoyi, respondeculo de la Medi-kultura Centro de Tergloba Vilaĝo, popola mediprotekta organizo, diris, ke la ĉi-foja verdiga aktivado por la Olimpikoj starigis ekzemplon de mediprotektado per komuna agado de la registaro kaj popolo. Por realigi la planon, ke Pekino havos la bluan ĉielon kaj klaran akvon, oni lanĉis konferencon por realigi la verdajn Olimpikojn, partoprenatan de registaraj departementoj, entreprenoj, mediprotektaj establoj, popolaj organizoj kaj civitanoj de Pekino.

Estas klare, ke la peto pri invito de la Olimpikoj al Pekino jam fariĝis movforto por akceli la laboron de diversaj departementoj de la pekina registaro. S-ro Wang Guangtao, vicprezidanto de la Pekina Komitato por Invito de la Olimpikoj kaj vicurbestro de Pekino, diris, ke la ĉi-foja agado por verdaj Olimpikoj estas tre

utila por radikale plibonigi la medion de Pekino. Oni prezentis la sloganon "Olimpikoj verdaj, scienc-teknikaj kaj humanistikaj". La paŝoj por verdaj Olimpikoj estas malfacile atingeblaj, tamen bone faritaj kun iaj fruktoj.

En Chaoyang-distrikto, Pekino, jam finkonstruiĝis modela strato unu km longa kun Olimpikoj kiel temo. Aprile de 2000 oni borderis tiun straton per gazonoj de 7 000 kvadrataj metroj, kio estas malofte vidata en Pekino.

Temas pri reguligo de la akvo-sistemo. Ni scias, ke Pekino disvolviĝis per riveroj, tamen dum longa tempo al ĝi mankis akvo, ĉar la akvofluo estis baritaj de ŝlimo kaj en 1998 oni komencis dragi la ĉefajn riverojn. Julie de 1999 ekis ŝipnavigacio inter la lagoj Kunming kaj Yuyuantan kaj ĉi-jare sur la suda ĉirkaŭurba kanalo komenciĝis navigado. Oni konstruis 6 senkovrajn naĝejojn ĉe la dragitaj lagoj.

Post nelonge finkonstruiĝos la 4-a rondŝoseo 65.48 km longa, kiu ne nur estos ekspresa ŝoseo, sed pli grave ambaŭ ĝiaj flankoj ricevos 700 hektarojn da verdigita spaco. La 13 aŭtovojoj trefkruciĝoj, iliaj proksimaj gazonoj kaj 18 grandaj publikaj lokoj kun verdaĵoj multe kontribuos por la peto pri invito de la Olimpikoj.

Ĝis nun Pekino jam priplantis 2 536 hektarojn da tero per arboj kaj herboj. Laŭ la plano oni devas priplanti 100 kvadratajn kilometrojn per arboj kaj herboj en la daŭro de 10 jaroj, sed nun la urba registaro decidis plenumi la planon en 2003. Krom tio oni konstruis verdan sportan bazon kaj verdan sportan parkon en Chaoyang-distrikto por la 500 000 loĝantoj.

De la peto pri invito de la Olimpikoj la pekinaj loĝantoj eksciis, ke la verdigado en ilia urbo eniris en novan etapon kaj ili havos pli bonan vivmedion. ■



Pitoreskejoj ĉe Huludao

de HU WEIXUAN

ĈE la orienta ekstremo de la Granda Muro, apud Bohai-mar, sidas la urbo Huludao. Ĝi estas nova industria havenurbo kun longa historio kaj allogaj pitoreskejoj.

En Huludao estas Xingcheng, urbeto konstruita en Ming-dinastio (1368-1644), kun historio de 550 jaroj. Ĝiaj urbomuroj en longo de 3 200 metroj faras ĝin kvadrata. Estas feliĉe, ke la urbomuroj kaj kvar turoj restas nedetrinitaj. Sur la interkruĉiĝejo de la du ĉefaj stratoj en la centro de la urbeto impone sidas tambura turo en antikva gusto.

Ne malproksime de Xingcheng estas parto de la Granda Muro, kiu staras sur akvo, inter du montoj kaj kun naŭ turoj.

En plua sezono rivero ŝveliĝas kaj torentas tra la truoj, formante imponan spektaklon.

Ĉirkaŭ Xingcheng estas varmfontoj, kie la pejzaĝoj diferencas de tiuj ĉe la Granda Muro. La temperaturo de la fontoj estas 70 °C kaj la akvo abundas je mineraloj tre utilas por kuracado de dermozoj, neŭrasteno kaj artrito. Tie estas arka plaĝo, pura akvo kaj milda deklivo de la bordo. Krome sur la bordo kreskas densa arbaro, kaj ĉio ĉi faras la lokon bona banejo vaste konata en Ĉinio.

Ĉe Huludao estas alia renoma turisma loko Jieshi. Ĝi ĝuas renomon dank' al la ruino de palaco loĝata de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221-206 a.K.) dum lia inspektado. La imperiestro unuigis Ĉinion kaj konstruis la grandiozan



Shengshui-templo

palacon. Vid-al-vide al la palaco, en maro, elstaras roko nomata Jieshi. Rigardate de oriente, la roko similas al bruna koko kokerikanta, sed rigardate de sude, ĝi similas al juna virino kun du infanoj, kiu atendas revenon de la edzo. Antaŭ ĉikaŭ 1 800 jaroj, kiam Cao Cao, estro de Wei-regno en la periodo de Tri Regno (220-280), estis preterpasanta la ruinon dum sia vojaĝo, li verkis tre faman poemon, kaj nun multaj ĉinoj ankoraŭ bone memoras ĝin. ■



La Granda Muro sur akvo kaj inter montoj

Kiu estas pli favordonema?

de YUAN XIAOHU

KIEL instruisto en fora vilaĝo, mi suferis mankon de manĝaĵo. Tie estis nenio alia krom brasiko kaj rafano. Mi estis malforta kaj bezonis bonajn nutraĵojn. Tial mi ofte aĉetis ovojn en vilaĝo najbare de la lernejo.

Estis maljunulino pli-ol-60-jara, kiu vendis al mi ovojn. Ŝi vivis solece kaj vivtenis sin per

kokobredado. Ovo kostis 0.45 juanon en mia vilaĝo, tamen por kompati ŝin mi aĉetis de ŝi ovon kontraŭ 0.5 juano kaj decidis daŭrigi mian favordonemon.

Kaj ni interkonsentis.



Poste mi decidis pagi 0.55 juanon por unu, sed ŝi kategorie rifuzis altigi la prezon. Post longa diskutado ŝi fine kapjesis.

Iun tagon mia bonkoreco perdis la ekvilibron. Kiel antaŭe mi iris al la maljunulino por

aĉeti ovojn, sed iu detalisto volis foraĉeti de ŝi la ovojn po 0.6 juano por unu. Ŝi rifuzis tion. Ŝi diris, ke ŝi vendos la ovojn al la maldika instruisto, ĉar li venis de fora loko, kaj ŝi deziras resanigi lin, por ke li povu daŭrigi sian instruadon en la lernejo.

Mi dronis en nekomprenemo. Antaŭe mi pensis, ke mi estas favordonema, sed fakte ŝi estas pli favordonema. ■






Teksto kaj fotoj de ZHAO XI kaj KUANG XIAOFENG

Sude en Pekino estas la Chongwen-a Eksperimenta Mezlernejo. Emfazante instrui sciojn al lernantoj, la lenejo pli akcentas kulturis ties talentojn en memlernado, pensado, memfarado kaj kreado. En la 5 jaroj post sia fondiĝo la lernejo kulturis multajn kapablulojn.

“Scio, intereso, sukceso” estas la principo de la lernejo. Per aŭdovida instruado la lernejo bone donas lecionon de eksperimento, por ke la instruado kaj lernado estu facilaj kaj gajaj kaj maksimume disvolviĝu la aktiveco de la instruistoj kaj la kreativeco de la lernantoj. La lernantoj multe rikoltis en malgrandaj inventado, manlaborado kaj disertacio. Poentoj kaj obeemo de lernantoj jam ne estas la unika kriterio de la lernejo por ekzameno de la nivelo de la instruistoj kaj lernokapablo de la lernantoj. Bonaj lernantoj estas tiuj, kiuj lertas en memfarado, havas viglan penson kaj praktikan manipuladojn kaj estas idealismaj, viglaj kaj larĝvidaj.



En kaj ekster klasĉambro



La historio de ŝuoj de Ĉinio (II)

- Knabinetoj terure suferis de piedvindado kaj senĉese ploradis. Kaj tiam la patrino konsolis: "Kun grandaj piedoj vi ne havos edzon."
- Jam antaŭ la naskiĝo de infano la patrino pretigis por li ŝuetojn kun ornamaĵo en figuro de kapo de tigro, fiŝo aŭ leporo. Oni kredis, ke tia ornamaĵo gardos la infanon.
- Ledaj botoj de nordanoj foje estis uzataj kiel militistaj ŝuoj kaj poste fariĝis ceremoniaj ŝuoj de militaj kaj civilaj korteganoj.

de PANG BIAN

LA evoluado de la piedvestoj de antikvuloj, ĉu botoj ĉu sandaloj, ĉu lignaj ĉu tolaj, havas striktajn rilatojn ne nur kun geografio, klimato kaj aliaj naturaj kondiĉoj, sed ankaŭ kun diversaj kulturaj fenomenoj de la socio. Ankaŭ la ŝato kaj malŝato de la regantoj kaj popolo havis influon sur la moro, fasono kaj teknologio de ŝufarado. Pro tio deriviĝis multaj kutimoj rilate ŝuojn kaj aperis multaj originalaj butikoj de ŝuoj.

PIEDVINDADO KAJ "TRICOLA PIEDO"

En antikva Ĉinio knabinoj en la aĝo de 4-8 jaroj estis devigite vinditaj je la piedoj, por ke ĉi tiuj poste fariĝu malgrandaj en 3 koloroj. Oni kredis, ke antaŭ 2 000 jaroj malgrandaj piedoj sinonimis kun beleco de virinoj. Kiam la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221 a.K. — 206 a.K.) elektis por si belulinojn, unu el la

kriterioj de beleco estis malgrandeco de piedoj. Ŝajne piedvindado komenciĝis en la 10-a jarcento. La lasta estro de la Suda Tang-regno (937-975) estis voluptema kaj muzikama. Li ordonis, ke servistino Ruiniang vindu siajn piedojn kaj dancu sur ora lotuso. Kaj poste la malgrandigitaj piedoj kaj la malgrandaj ŝuoj estis nomataj ankaŭ "tricola ora lotuso".

La virinoj terure suferis de piedvindado. Kun misformitaj piedoj, la virinoj jam ne povis iri rapide. Sed la regnestro ŝatis tion, kaj multaj aliaj servistinoj imitis tion, tiel la moro disvastiĝis en la popolo. La moro furoris en la dinastioj Song (960-1279) kaj Ming (1368-1644). Eĉ judinoj en Ĉinio akceptis piedvindadon.

Knabinetoj terure suferis de piedvindado kaj senĉese ploradis. Kaj tiam la patrino konsolis: "Kun grandaj piedoj vi ne havos

edzon." Tiu patrino diris la veron, ĉar tiam la viroj elektis edzinon antaŭ ĉio laŭ la grandeco de la piedoj de la svatita fraŭlino. Ju pli malgrandaj estis la piedoj de la fraŭlino, des pli granda la donaco de la fraŭlo.

La virinoj neniam devis lasi aliajn vidi iliajn piedojn nudaj, sed devis porti ŝtrumpojn eĉ en varmega somero. Kutime ili sidis sur siaj genuoj aŭ interkrucitaj kruroj, tial ili brodis siajn ŝtrumpojn je ĝiaj dorso, plandumo kaj kalkanumo, por ke aliaj vidu nur la brodaĵojn. Ili unuafoje montris siajn piedojn nudaj al sia edzo en la geedziĝa nokto. Antaŭ ol forlasi la gepatrojn, la novedzino devis surmeti ŝuojn kun purpura dorso kaj blanka plandumo. Atingante la hejmon de la novedzo, ŝi devis porti flavajn ŝuojn kaj nokte, en la dormoĉambro de la novgeedzoj, ŝi devis porti dormoŝuojn. Interne de la ŝuoj estis broditaj la bildoj pri seksumado, kaj la novedzo devis demeti ŝiajn dormoŝuojn ĉe la enlitiĝo. De tiu momento komenciĝis ilia nova vivo.

En 1644 Qing-dinastio prenis Pekinon kiel ĉefurbon. Manĉurinoj ne vindis siajn piedojn kaj portis ŝuojn kun alta bloketo sub la plandumo. La bloketo el ligno estis tegita per blanka tolo kaj altis 7-13 cm. Kun larĝa supro kaj malpli larĝa malsupro ĝi estis nomata "florvazo", kaj tiu kun larĝa malsupro kaj malpli larĝa supro — "ĉevala hufo". Antaŭ



Qing-dinastiaj ŝuoj kun alta bloketo sub la plandumo

ol kapti la regantecon super la tuta Ĉinio, la manĉuroj vivis en la nordoriento kaj la virinoj havis la kutimon kolekti fungojn sur montoj. Por gardi sin kontraŭ serpentoj, ili alligis al la plandumoj lignan bloketon. Iom post iom la kutimo disvastiĝis kaj eĉ la imperiestra patrino Cixi portis "florvazajn" ŝuojn. La palacaj virinoj portis tiajn ŝuojn, dum Han-nacianoj daŭre piedvindis siajn knabinetojn. Kvankam la registaro de Qing-dinastio dekretis malpermesi piedvindadon, sed vane. Tiu kutimo ĉesis nur en la mezo de la 20-a jarcento, kiam fondiĝis la nova Ĉinio, poste la ĉinaj virinoj povis eliri el la hejmo, lerni aŭ labori kiel la viroj.

ETIKETOJ

Antikvaj ĉinoj vivis laŭ rigoraj etiketoj. Kaj tion pruvis la kutimo rilate ŝuojn. En Zhou-dinastio (11-a jc. a.K. — 256 a.K.) estis regulo, ke oni devas demeti siajn ŝuojn antaŭ eniro en alies domon. "Kiam oni vidas ŝuojn ĉe la pordo kaj ne aŭdas voĉon, oni ne devas eniri en la domon." Kaj krome, ĉeestante bankedon aŭ akceptate de suvereno, oni devis demeti siajn ŝuojn kaj ŝtrumpojn. Sed en kulto oni ne devis lasi la piedojn nudaj, ĉar tio estis maldeca.

En la antikveco estis nuptoŝuo, mortoŝuo kaj funebra ŝuo. La nuptoŝuo estis rozkolora aŭ ruĝa, kun bela brodaĵo. En Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) virinoj ĉe edziniĝo portis bildohavajn lignajn sandalojn kun buntaj silkaj rubandoj. Manĉuraj virinoj ĉe edziniĝo portis ŝuojn el blua tolo, kaj en la antaŭa parto estis ruĝa ideogramo signifanta feliĉon.

Mortintoj portis mortoŝuojn. Dum la periodo de 206 a.K. ĝis 420 p.K. forpasintaj imperiestroj portis jadajn ŝuojn kaj vestojn el miloj da jadaj pecoj kunligitaj per ora fadeno. En Qing-dinastio (1644-1911), en la funebra

ceremonio de imperiestroj oni devis forbruligi iliajn botojn kaj ŝuojn. Ekzemple, post la morto de imperiestro Guangxu (1875-1908) oni forbruligis liajn 104 parojn da ŝuoj. La forpasintaj ordinaraj viroj portis mortoŝuojn el blua, nigra aŭ bruna tolo, kaj la virinoj la belkoloro broditajn. Sur la plandumoj de mortoŝuoj por ambaŭ seksoj estis broditaj lotuso kaj eskalo, kio portis la deziron de la vivantoj, ke la mortintoj povu iri en paradizon.

La familianoj de mortinto devis vesti sin per blankaj vestoj kaj porti funebrajn ŝuojn anstataŭ belkoloraj. Ofte funebraj ŝuoj estis faritaj el kanabo aŭ pajlo. Poste oni alkudris al tolaj ŝuoj malgrandan pecon da blanka ŝtofo kaj aldonis al kalkanumo etan strion da ruĝa ŝtofo por montri funebroon pro membro de pli aĝa generacio. Kiam oni gratulis longvivulon, oni surmetis sur lin ŝuojn kun ideogramo signifanta longvivecon.

En infanaj ŝuoj estis plene enkorpigita sincera amo de patrino. Jam antaŭ la naskiĝo de infano la patrino pretigis por li ŝuojn kun ornamaĵo en figuro de kapo de tigo, fiŝo aŭ leporo. Oni kredis, ke tia ornamaĵo gardos la infanon. Antaŭe, en vintro, oni portis vatitajn ŝuojn en formo de mitulo. Oni diris, ke antaŭe tiaj ŝuoj estis faritaj de patrino por infano, kaj ŝu-dorso el du konkoformaj pecoj simbolis kunmetitajn manplatojn de la patrino, ameme tenantajn la infanon.

En la feŭda socio rango estis enkorpigita en ŝuoj. En la Suda Dinastio (420-589) malriĉuloj povis porti nur pajlajn sandalojn kaj ŝuojn el kruda ŝtofo aŭ iri nudpiede, kaj aristokratoj

portis ŝuojn el ledo aŭ silko. Ankaŭ la koloroj de ŝuoj estis rigore difinitaj: soldatoj kaj laboruloj devis porti la nigrajn, verdajn aŭ blankajn kaj geservistoj la ruĝajn aŭ nigrajn. La malobsevantoj de la difino estis punitaj. En la Okcidenta Jin-dinastio (265-317) la regantoj malestimis komercistojn kaj ordonis al ili porti ŝuojn, unu blankan kaj la alian nigran. En Qing-dinastio (1644-1911) estis difino, ke la hele flava koloro estis uzata ekskluzive de imperiestro, la ore flava de aristokratoj kaj la abrikotflava de plebanoj.

CENT-JARA BUTIKO DE ŜUOJ

Ledaj botoj de nordanoj foje estis uzataj kiel militistaj ŝuoj, kaj ankaŭ trovis ŝaton ĉe la popolo. Jam en Sui-dinastio (581-618) la senĉese ŝanĝiĝantaj ledaj botoj fariĝis ceremoniaj ŝuoj de militaj kaj civilaj korteganoj. En Qing-dinastio la botoj fariĝis



La ŝuobutiko "Nei Lian Sheng"

Lotus-lanterno

Temas pri mito kiel Chenxiang savis sian patrinon.

Diino Sanshengmu enamiĝis al Liu Yanchang, klerulo en la surtera mondo. Ŝia frato, dio Erlang, firme tion malaprobis. Ŝi senhezite descendis al la homa mondo por ĝui feliĉan vivon. Dio Erlang venis kapti ŝin, sed li retiriĝis antaŭ la magia forto de la lotus-lanterno de Sanshengmu. La lanterno estas magia kaj povas venki la fiulojn kaj doni feliĉon al la bonkoruloj.

Poste Liu Yanchang mortis kaj Sanshengmu sola flegis la filon Chenxiang.

Foje Chenxiang senatente tuŝis la lotus-lanternon, kaj ĝi ekbrilis. Dio Erlang vidis la ekbrilon kaj forŝteligis Chenxiang.

Diino Sanshengmu iris al dio Erlang por repreni de li sian filon. Sed Erlang rifuzis redoni la infanon kaj forrabis la lanternon. Krome li metis Sanshengmu sub Huashan-monton.

Chenxiang en la ĉiela palaco volis savi sian patrinon kaj la tera dio diris al li, ke li sin turnu al simioreĝo Sun Wukong. Dank' al

helpo de simieto Chenxiang reakiris la lotus-lanternon kaj serĉadis Sun Wukong en la surtera mondo. Post kelke da jaroj elkreskis Chenxiang. Iom post iom li komprenis, ke oni devas fari ĉion per si mem. Sun Wukong donacis al li blankan ĉevalon kaj diris, ke la magia hakilo povos helpi lin savi la patrinon.

En la brilo de la lotus-lanterno, Chenxiang kuraĝe batalis kontraŭ dio Erlang. Fine li trahakis la monton kaj savis sian patrinon.

La bildlibro estis adaptaĵo de movbilda filmo kun la sama titolo. Simplaj tekstoj por la belaj bildoj estas facile legeblaj.

112 p. 165x225 mm.
Prezo: 8.00 USD
Sendokosto: 3.00 USD
Mendu ĉe:

- Distribua Fako de EPC
- Libroservo de UEA
- Nia peranto en via lando



brokataj en du specoj, unu kun plata antaŭo kaj la alia kun pinta. Kutime la korteganoj portis pintajn ŝuojn, sed kiam ili estis vokitaj al imperiestro, ili devis porti platajn ŝuojn. Antaŭe iliaj ŝuoj estis faritaj en kortegaj metiejoj, sed poste en speciala butikio de ŝuoj.

La mastro de la butikio, s-ro Zhao Ting, antaŭe estis metilernanto en iu metiejo de ŝuoj. Li estis saĝa kaj lerta. La mandarenoj kaj imperiestraj familianoj certe bezonis ŝuojn, kaj li kaptis la ŝancon kaj venis al la ĉefurbo Pekino por gajni de ili monon per farado de korteganaĵoj. Li titolis sian butikon per la nomo "Nei Lian Sheng", signifanta, ke "la portantoj de liaj ŝuoj certe rapide promociiĝos en la kortego". Lia flato plaĉis al la mandarenoj.

La rigoraj difinoj rilate ritojn

en la kortego puŝis la butikon al senĉesa plibonigo de teknologio. La plandumo el 32 tavoloj da tolo estis dika, sed ne peza. La brokataj ŝuoj estis glataj kaj brilaj, kaj la polvo sur la ŝuoj estis tre facile forigebla. Tiaj ŝuoj bone sidis sur la portantoj, kaj ĉi tiuj sentis komforton. La ŝuoj estis faritaj ĉiu laŭ piedmezuro. Oni ne bezonis adapti la piedojn al la ŝuoj, sed la ŝuojn al la piedoj. La butikio detale registris por la mendantoj iliajn devenon, rangon, la formon kaj grandecon de iliaj piedoj. Dank' al tio pli kaj pli famiĝis la butikio. Se mandarenoj volis novajn ŝuojn, ili bezonis nur sendi sian serviston al la butikio, kaj la butikio jam povis rapide pretigi la ŝuojn laŭ siaj enskribitaj informoj pri la mendantoj. La notoj intimigis la butikon kun la klientoj kaj estis tre oportunaj por la subaj

mandarenoj, kiuj volis flati altrangulojn per donacado de novaj ŝuoj. La butikio pli kaj pli prosperis kaj ĝuis grandan famon eĉ eksterlande.

Poste la feŭda registaro estis renversita, kaj la butikio turnis sian servon al ordinaraĵoj laboruloj. Malgraŭ ke ordinaraĵoj laboruloj fariĝis ĝiaj klientoj, ĝi daŭre tenas grandan sincerecon en sia laboro kaj ĉiam liveras altkvalitajn tolajn ŝuojn.

La ŝuoj de la butikio estas vaste ŝatataj, kaj ĝi ĉiam havas multajn klientojn. La eminentuloj, kiuj amas la tradician ĉinan kulturon, la intelektuloj alte klerigitaj, la ĉinaj elmigrintoj kaj la alilandaj turistoj, ĉiuj ŝatas la ŝuojn faritajn de la butikio, kaj iuj el ili aĉetas plurajn parojn en unu fojo, kaj krome, ĉiuj povas mendi ŝuojn laŭ sia propra mezuro. ■

● En 2000 la nacia ekonomio de Ĉinio stabile kreskis. La totala enlanda produktovaloro kreskis je pli ol 8% kaj la pokapa produktovaloro superis 800 usonajn dolarojn.

● En la jaroj 1979-1999 Ĉinio enkondukis sume 306 miliardojn da usonaj dolaroj, per kiuj Ĉinio okupas la duan lokon de la mondo, nur post Usono.

● La Pekin-Shenyang-a Ekspresa Aŭtovojo 658 km longa estis finkonstruita kaj lanĉita al trafiko. Koncerna departemento diris, ke en la fino de 2000 la totala longo de ekspresaj ŝoseoj atingos 15 000 km.

● En la orienta parto de Tianshan-montaro, Xinjiang, oni trovis grandegan kuprominejon kun rezervokvanto de 10 milionoj da tunoj. Oni diris, ke ĉiujare Ĉinio importas 500 000 tunojn da kupro. La malkovro kaj ekspluato de la menciita kuprominejo certe utilos al nia lando en kuproprovizo.

● Nun en Ĉinio 330 milionoj da virinoj havas profesion, kiuj konsistigas 46.7% de la tutlanda laborantaro de Ĉinio.

● Oktobre, ĉi-jare, ĉinaj akrobatikaj pilotoj per leĝeraj aviadiloj faritaj de Ĉinio 4-foje sukcece traflugis la ĉefan pontarkaĵon 6 m altan kaj 34.91 m larĝan de la ŝosea ponto super Taihu-lago kaj tiun 6 m altan kaj 26.75 m. maldekstre de ĝi kaj per tio metis rekordon de

nia lando. Tiun aktivadon partoprenis sume 6 pilotoj.

● La Dua Ŝanhaja Internacia Industria Foiro okazis oktobre de 2000 en la Ekspona Centro de Ŝanhajo.

En la foiro oni eksponis ĉefe novajn teknologiojn kaj modernajn industriajn ekipaĵojn. En la foiro okazis ne nur interŝanĝo de varoj, sed ankaŭ tiu de diversaj teknologioj kaj proprietoj. La foiro manifestis la novan fizionomion de la moderna industrio, sciencoj kaj tekniko kaj ekstera komerco de Ŝanhajo kaj akcelis interŝanĝon inter Ĉinio kaj aliaj landoj.


● Per 52'22'' kun neniu savzono ĉina bravulo Atili sukcese iris 1 389 m. sur kablo, liganta du montpintojn, kaj per tio kreis Guinness-rekordon.

● Zhao-maŭzoleo de Li Shimin (599-649), imperiestro de Tang-dinastio, estas nomata ankaŭ la unua imperiestra maŭzoleo en Ĉinio. Ĝi kuŝas en la provinco Shaanxi. De oktobro, 2000, eksponiĝas 252 ŝtatnivelaĵ historiaj objektoj trovitaj en la proksimaj tomboj akompanantaj Zhao-maŭzoleon, kiu okupas 20 000 hektarojn, kie kuŝas sume 188 akompanaj tomboj. La mondfamaj 6 skulptitaj elitaj ĉevaloj de Zhao-maŭzoleo kaj ŝtonaj portretoj de ĉefoj de 14 emirlandoj kuŝis sur altaro norde de la maŭzoleo.

● Sensacion faris en Usono la ekspozicio de ĉinaj antikvaj skulptitaj ĉevaloj. Nun tie

eksponiĝas 350 skulptitaj ĉevaloj ornamitaj per oro, bronzo, smeraldo, porcelano kaj ruĝa ceramikaĵo, famaj trikoloraj glazuritaj ĉevaloj faritaj en Tang-dinastio, argilaj pupoj kaj ĉaroj trovitaj en la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, en Xi'an. La valoraj skulptaĵoj estis faritaj en la tempo de Zhou-dinastio (11-a jc. — 256 a.K.) ĝis Qin-dinastio (1644-1911). Tie eksponiĝas ankaŭ skulptitaj virinoj, ĉasantaj aŭ ludantaj poloon kaj muzikilon sur ĉevalo. Ili estas tre ŝatataj de usonoj sinjorinoj.

● La 24-an kaj 25-an de oktobro, la Kultura Ministerio de Ĉinio okazigis Simpozion pri Kultura Interŝanĝo inter Ĉinio kaj Afriko en Nova Jarcento. La simpozion ĉeestis altrangaj oficistoj de 22 afrikaj landoj, Unuigita Organizo de Afriko kaj reprezentantoj de koncernaj departementoj, popolaj organizoj, sociaj kaj scienc-esploraj stabloj de Ĉinio. La simpozio resumis sperton pri la kultura interŝanĝo de la du flankoj, diskutis pri la novaj enhavoj, metodoj kaj kanaloj de la kultura interŝanĝo sub novaj cirkonstancoj. Kiam okazis la simpozio, ŝtata ensemblo de Kongolando (Brazavilo) speciale venis Ĉinion kaj faris prezenton. Tiam okazis ankaŭ grandskala ekspozicio de fotoj kun la temo "Ĉinio kaj Afriko".



Aviadiloj flugantaj tra la ĉefa pontarko

Konu "La Mondo"

"La Mondo", revuo en Esperanto kaj la ĉina lingvo, estas redaktata de la Ĉina E-Ligo cele disvastigi Esperanton kaj konigi la ĉinan kaj alilandajn E-movadojn. En la 20 jaroj post sia naskiĝo en 1981, "La Mondo" ludis konsiderindan rolon en disvastiĝo de la ĉina E-movado, havante legantojn en diversaj lokoj de Ĉinio kaj eĉ en aliaj landoj.

Ni decidis pliriĉigi ĝian enhavon kaj plibonigi ĝin ekde la unua numero de 2001. Por tiu celo ni malfermos rubrikojn temantajn pri diversaj lokoj de la mondo kaj diversaj nacioj sur la terĝlobo, aperigos kernajn artikolojn kaj bildojn, konigos la mondon al niaj legantoj kun la celo akceli la interŝanĝon kaj kunlaboron inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj. Por ke ĝi pli komplete montru la mondon al siaj legantoj kaj estu pli vaste ŝatata, ni bezonas konstantajn esperantistajn kontribuantojn el diversaj landoj. Informoj, artikoloj kaj bildoj pri diversaj nacioj estos bonvenaj.

Jen novaj rubrikoj por la venonta jaro: "Rigardo al la mondo", "Sentimentaleco", "Servo", "Interesaĵoj kaj anekdotoj" k.a. Estas bezonataj jenaj artikoloj kaj bildoj temantaj pri a) moroj kaj kutimoj, nacia kulturo; b) vivo de ordinaraj homoj; c) kortuŝaj rakontoj de familio kaj amafero; ĉ) novaj vivo kaj modo de junuloj; d) temoj rilataj al Ĉinio, kiaj ĉinoj, ĉinaj varoj kaj ĉina kulturo en aliaj landoj; e) filmoj, televidaj programoj, muzikaĵoj kaj steluloj; f) legindaj libroj; g) eduka sistemo, altlernejoj kaj enoficiĝo; ĝ) investaj politikoj kaj informoj; h) famaj vidindejoj kaj historiaj restaĵoj; ĥ) fokusaj temoj; kaj i) humuraĵoj kaj eseoj. Artikoloj pri Esperanto estos, kompreneble, bonvenaj, kiaj intervjuo kun famaj

e-istoj, novaĵoj pri la E-movado, informoj pri diversaj E-organizoj, novaj libroj, amikaj rilatoj inter ĉinaj kaj alilandaj e-istoj, k.a. Krome, estos paĝo por amikiĝo, kie troviĝos la nomoj kaj adresoj de alilandaj e-istoj, kiuj deziras korespondi kun la ĉinaj kaj povas interŝanĝi spertojn.

Estos bonvenaj fotoj kaj bildoj temantaj pri: a) pejzaĝoj de urbo kaj vilaĝo, famaj vidindejoj kaj historiaj restaĵoj; b) vivo de ordinaraj homoj, precipe tiu de e-istoj; c) modernaj junuloj kaj ilia vivo; ĉ) lerneja vivo; d) steluloj; e) novaj poŝtmarkoj; kaj f) E-aktivadoj, Esperantaj konstruaĵoj, stratoj, statuoj, emblemoj ktp, precipe fotoj de belaj stelulinoj kaj e-istinoj el diversaj landoj kun artikoleto pri ili por la kovrilpaĝo de la revuo.

Ni esperas kiel eble plej rapide trovi kunlaborantojn en diversaj landoj kaj konstante kunlabori kun ili. Ili povos sendi al ni siajn artikolojn kaj tradukaĵojn el lokaj ĵurnaloj aŭ gazetoj, aŭ originalajn artikolojn en la lingvo angla aŭ franca. Post la aperigo de la artikolo, ni sendos ekzempleron al la kontribuanto kaj rekompencos per Esperanta libro, donacaĵo aŭ alimaniere tiujn, kiuj ofte kontribuas al ni.

Ni deziras sinceran kunlaboron kun diverslandaj E-organizoj kaj e-istoj. Por akceli la interŝanĝon inter Ĉinio kaj aliaj landoj, por la bela perspektivo de Esperanto, ĉiuj e-istoj kunlaboru kun ni.

Adr.: "La Mondo", P.O. Kesto 825, Pekino CN-100037, Ĉinio

Tel.: +86-10-6832 6682

Telefakso: +86-10-6832 1808

Retpoŝto: <cel@china-report.com>

Redakcio de "La Mondo"

Glazurita vazo kun bluaj desegnoj

de WANG TIANXING

La ĉinaj porcelanaĵoj estas faritaj el kaolino kaj pulvoro de feldspato kaj kvarco post muldado, sekigo kaj bakado. Estas porcelanaĵoj glazuritaj kaj neglazuritaj.

Tiu ĉi glazurita vazo kun bluaj

desegnoj estis farita en Yuan-dinastio (1206-1368). La desegnoj, versimilaj, blue kaj iom purpure glazuritaj, elspiras tipajn orientajn trajtojn.

Ĝi altas 41 cm, kun aperturo 15.5 cm larĝa kaj fundo 18.5 cm larĝa. Ĝi estas konservata en la Muzeo de la Imperiestra Palaco en Pekino.





Glaciaj pendaĵoj sur arbo ĉe Songhua-rivero

Foto de LIU SIGONG

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》二〇〇〇年第十二期
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2